XVIa jaro. N° 238 (6) ★ Monata ★ Junio 1920

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARA ABONO

Simpla abono	10. — Frankoj
Kun la membreco de UEA	12.50 Frankoj
Unu numero	1. — Franko

Svisa poŝtĉeko III. 2600. — La abonoj komenciĝas en januaro

REKLAMO

Anonco (unu-centimetra kolonero)	2. — Frankoj
Anonceto (1 linio: 10 vortoj)	0.50 Franko
Korespondado (1 enskribo)	0.75 Franko

Rabatoj: 3 enpresoj 10 %: 12 enpresoj 25 %

DIREKTINTO: HECTOR HODLER — REDAKTORO: D-ro EDMOND PRIVAT, GENÈVE
ADRESO DE LA REDAKCIO KAJ ADMINISTRADO: MUSEUMSSTRASSE 14, BERN

TEKSTO. — *La Verko de H. Hodler,* Edmond Privat. — **Nuntempaĵoj:** *Fervojo London-Tanger-Dakar,* G. Houard. — **Socia vivo:** *Persio,* Iv. H. Krestanov. — **Notoj.** — **Literaturo:** *El miaj reĝaj interrilatoj,* Jan Havlasa. — *Tri tomboj,* A. Mexin. — *Pri Esperanta literaturo kaj ĝia historio,* F. Glaser. — **Esperantismo:** *Hector Hodler †.* — *Kroniko.* — *Dek-dua Universala Kongreso de Esperanto.* — *Internacia Instituto de Esperanto.* — *Diversaĵoj.* — *Tra la gazetaro.* — *Tra la libraro.* — *Lingvaj Studoj.* *Oficiala informilo de UEA.* — *Esperantista Parolejo.* — *Esperantista Vivo.* — *Niaj Mortintoj.* — *Esperantista Literatura Asocio.*

LA VERKO DE H. HODLER

Ho ve, neniam plu ni aŭdos ĉi-tie la firman voĉon de Hector Hodler, kiu tiel saĝe gvidis nin. Sed lia verko restas. Ni relegu liajn skribaĵojn, precipe liajn ĉefartikolojn dum la milito kaj poste.

En ili ni trovos valoran instruadon por la estonto. Kiam la preskondiĉoj estos iom pli favoraj, utile estus, ilin represi. Post la Kongresaj paroladoj de Zamenhof, ili estus rekomendinda legaĵo al ĉiu esperantisto.

H. Hodler estis logika sekvanto de nia Majstro. La noblajn principojn de Zamenhof li sciis apliki al la nuna tempo kun rimarkinda sento pri realaĵoj.

Per Esperanto la genia iniciatinto de la lingvo celis starigi neŭtralan fundamenton, super kiu la homoj ĉesus esti antaŭ ĉio nacianoj kaj fariĝus homaranoj. Tamen, pro lokaj cirkonstancoj, nia movado longe restadis sur la kampo de nura propagando laŭnacia.

Hodler ĝin eltiris el tiu periodo kaj organizis la supernacian grundon, kie ĉiuj individuoj rekte ekrilatas inter si sen ia diversigo pri gentoj aŭ regnoj. Tiam la rondo familia povis praktike realiĝi, kaj la lingvo estis tuj uzebla kun ĝia plena celo. Sen UEA la Esp. movado similus ĉiujn aliajn movadojn. Ĝi estus nur ia federacio de naciaj organizaĵoj, kies nur ĉefoj interrilatus inter si kaj kies popolamasoj eĉ ne havus okazon uzi mem Esperanton.

Naciaj societoj estas tre necesaj por propagandaj celoj, sed kiom pli efika estas ilia laborado, kiam ilia membraro spertas mem la utilecon de la lingvo kaj rekte inspiriĝas el konstanta internacia komunikado!

Ne nur al nia movado limiĝis tiu tendenco de Hodler. Al tuta estonta organizo de l' homaro li celis prepari la vojon. Neniu pli ol li deziris interŝtatan Ligon, sed li volis ĝin igi vere efikan per internacia edukado de la popolamasoj, instruante ĉiun homon kiel fariĝi homarano.

La fundamenton al tiu nova ordo li ekkonstruis per UEA, ĉar li konsideris utila nur edukadon per sperto, ne per frazista predikado. Lin mem multe instruis la vivo kaj ĝiaj maldolĉaĵoj.

El la akraĵoj de lia infaneco li konservis fortan malfidon al malplenaj vortoj kaj tre kritikeman juĝon. Tio helpis lin eviti ĉiun iluzion. Multfoje ni admiris lian akuratan honestecon rilate al ciferoj aŭ statistikoj, kontraŭe al tro blufemaj fervoruloj.

Sed super ĉio regis ĉe li forta volo kaj ideala espero. La malpraktikaĵojn aŭ iluziojn li forbalais nur por helpi veran antaŭenmarŝon al efektiva progreso. Lia severa racio servis nur lian altan bonkoron. Dum li tiel discipline organizis UEA por reciproka interhoma helpado, li mem donis la ekzemplon de plena sindono eĉ en malgrandaj detaloj.

⁂

Lia trankvila saĝo ebligis lin montri la vojon jam de malproksime. Kio ŝajnis al ceteraj kvazaŭ profetaĵo estis por li nur simpla atentemo je faktoj. Naŭ monatojn antaŭ la fino de la milito, en marto 1918, li skribis en tiu ĉi gazeto:

„Estas verŝajne eraro, kredi, ke tuj post la formala subskribo de la packontrakto, la eksteraj kondiĉoj subite refariĝos tiel favoraj kiel antaŭ la milito. La nuna krizo profunde ŝancelas la moralan, politikan kaj ekonomian fundamentojn de la socia vivo. La popoloj serĉas novajn vojojn. Ilin tedas la malnovaj putriĝintaj sistemoj kaj aranĝoj; ion novan ili aspiras, sed ili ankoraŭ erarvagas en la mallumo kaj nescias jam elekti. Oni eksentas, ke la mondo estas graveda je nova ordo, sed kia ĝi estos, neniu povas nun profeti. La militon kredeble sekvos akraj bataloj inter la diversaj tendencoj, kiuj alcelas la reorganizon de l' mondo. Ĝi rekutimigis la homaron je la uzo de la perforto, kaj ĉio lasas supozi, ke tiuj bataloj ne ĉiam fariĝos per pacaj rimedoj. Ĉiuokaze estas tre dube ĉu nia generacio ree travivos epokon tiel relative trankvilan kiel estis la antaŭmilita periodo.

Se ni do atendas plenan retrankviliĝon de la monda vivo, ni ja riskas atendi tre longe. Pli saĝe estas de nun adaptiĝi al la novaj vivkondiĉoj kaj antaŭvidi, ke dum certa tempo nia agado disvolviĝos en la tumulta atmosfero de batalema periodo."

Du jaroj da posta sperto montris, ke Hodler estis prava. Jam granda parto de l'Esperantistaro ĝin komprenis kaj kuraĝe rekomencis labori. En „Novaj Perspektivoj“ H. Hodler ekzamenis la nunan taskon kun granda klarvido. Laŭ li, Esperanto pruvis jam sian taŭgecon kaj vivantecon sur literatura kampo. Al ĝi nur mankas teknikaj vortaroj. Li deziris, ke oni traduku modernajn ideajn aŭ teknikajn verkojn kaj poste eltiru la necesan vortaron laŭ sperto.

Nia lingvo devas esti preta por akcepto, kaj tia ĝi ankoraŭ ne estas por multaj fakoj. Ankaŭ li prave insistis pri la bezono je pli plena ellernado de la lingvo. Mankas ĉe ni granda nombro da bonaj verkistoj, perfektaj tradukistoj, lertaj instruistoj. Prepari tiajn estas urĝa laboro.

Pri organizo de la Esperantistoj H. Hodler ankaŭ deziris koncentrigon. Li proponis ŝparon de samcelaj centroj, pli klaran dividon de laboroj kaj profiton de ekzistanta forto kiel UEA, por daŭre subteni la Lingvajn kaj Kongresajn instituciojn.

⁂

Pri ĝeneralaj homaraj interesoj la ideoj de H. Hodler ne estis malpli klaraj. En „Novaj Vojoj“ li tie ĉi defendis ilin per argumentado majstra. Jam en 1916 kaj 1917, eĉ antaŭ la famaj paroladoj de Prezidanto Wilson, li montris, kiamaniere paco povus esti starigata sur la mondo.

Nacia libereco, demokratia regado, internacia ŝtatligo ŝajnis al li la tri ĉefaj elementoj necesaj. Nacia libereco, tio signifis por li dispartigon de teritorioj laŭ volo de la loĝantoj, respekto al malplimultoj, ĉesigo de barbara ekspluatado de homoj per homoj en kolonioj kaj aliloke.

Demokratia regado, tio estis laŭ li absoluta rajto de la nacianoj kontroli la tutan mastrumadon de la naciestroj inkluzive la traktadon kun najbaroj kaj la dispartigon de riĉaĵoj. Li deziris forigon de sekreta diplomatio kaj malpotencigon de la mono per ŝanĝo de l' ekonomia reĝimo.

Internacian ŝtatligon li proponis por ebligi la homojn servi ion super apartaj ŝtatoj kaj anstataŭi absurdan militarismon per komunaj internaciaj interesoj.

Por atingi tiujn progresojn, Hodler ne fidis je absolutaj teorioj. Nek la nura predikado al individua reformo, nek la blinda kredo je nur ekonomia ŝanĝo ŝajnis al li pravaj. Super ĉio li malfidis perforton kiel efika rimedo.

En sia lasta novjara artikolo, li insistas pri *edukado*, kio ŝajnis al li la plej grava rimedo. Sinedukado, edukado de la homoj, edukado de l' popoloj, detruo de l'antaŭjuĝoj, preparado al tuthomaraj sento kaj vivado. Jen la necesaĵo plej urĝa.

Por tiu mirinda tasko, UEA estas ilo potence taŭga, ĉar ĝi funkciigas tiun unuarangan edukilon: Esperantismo. Tial Hector Hodler fordonis al ĝi sian tutan vivon.

Edmond Privat.

NUNTEMPAĴOJ

Fervojo London-Tanger-Dakar

Post longe daŭrinta profunda studado, la tunelo sub la Kanalo, inter Dover kaj Calais, estos verŝajne realigita post kelkaj jaroj. La politikaj kaj militistaj kaŭzoj, kiuj malhelpis la efektiviĝon de tiu projekto, ne plu ekzistas, kaj la ĉefaj Britaj ŝtatistoj ĝin nun akceptas.

La submara tunelo havas precipe ekonomian intereson: de ĝia kreiĝo certe rezultos duobliĝo aŭ triobliĝo de la trafiko de l' vojaĝantoj kaj komercaĵoj. Ke la martraveturo grave malhelpas la intensiĝon de la komercaj interŝanĝoj pruvas la statistiko. Inter Francio unuparte, kaj Belgio-Nederlando aliparte, la nombro de la vojaĝantoj irantaj de lando al alia atingas ĉiujare 4½ milionojn, t. e. 9 % de la loĝantaro. Inter Francio kaj Germanio tiu cifero, antaŭ la milito, estis 4 % de la loĝantaro de ambaŭ landoj. Kontraŭe, inter Francio kaj Britio, vojaĝis ĉiujare nur 1,200,000 personoj, t. e. nur 1 % de la loĝantaroj Brita kaj Franca. Tiun diferencon klarigas la neceseco de la marvojaĝo. Pri la komercaĵoj la diferenco estas ankoraŭ pli granda. Dum la komercaj interŝanĝoj inter Francio kaj Germanio plialtiĝis je 163 % en dek jaroj, tiuj inter Francio kaj Britio montris kreskon de nur 60 %.

La tunelo sub la Kanalo estas do bonega solvo, ĉar ĝi permesos ligi Parizon kaj Londonon per tute rekta fervojo povanta tage transporti laŭ ĉiu direkto 30,000 vojaĝantojn kaj 50,000 tunojn. Se ĝi ne havus alian utilecon ol plifaciligi la komercajn rilatojn inter Francio kaj Britio, ĝia konstruo, malgraŭ la altega kosto, estus tamen plene pravigata.

Sed multe pli gravan rolon ĝi estas ludonta, se al la demando de la Kanala tunelo oni ligas tiun de la Gibraltara tunelo. La realigo de ambaŭ projektoj efektive vidigas grandiozajn perspektivojn, ĉar la fervoja trapaso de la Kanalo kaj de Mediteraneo permesus senpere ligi la ĉefajn Eŭropajn urbojn kun la grandaj Afrikaj centroj.

Kvankam malpli konata, la projekto de la Gibraltara tunelo, inter Eŭropo kaj Afriko, ne estas malpli grava. Ĝia realigo interesas ne nur Hispanion, sed ankaŭ Francion, kiu per ĝi povus multe pli rapide interrilati kun siaj kolonioj, speciale Maroko, kaj eĉ tutan okcidentan Eŭropon, al kiu certe utilos la pli facila transporto de la Afrikaj produktaĵoj.

Franca inĝeniero, S-ro Henri Bressler, studis projekton, kies efektivigo kostus 250 milionojn da frankoj. Ĝi estas nur parto de pli vasta plano, celanta la konstruon de fervojo inter Parizo kaj Dakar en Senegalio. Se la Gibraltara tunelo nur plifaciligus la komercajn rilatojn inter Francio, Hispanio kaj Maroko, ĝi malgraŭ sia utileco ne estus bonkondiĉe realigebla, ĉar la ekspluat-enspezoj ne sufiĉe frue kompensus la altajn elspezojn, kiuj rezultos de tiel vasta entrepreno. Sen la apogo de la registaroj Franca kaj Hispana, estus malfacile fondi societojn por la konstrulaboroj. Kontraŭe, se oni konsideras, ke la tunelo sub la Gibraltara markolo ebligos ne nur rapidan kaj senŝipan komunikiĝon inter Francio, Hispanio kaj Maroko, sed ke ĝi ankaŭ kunligos tri kontinentojn, la entrepreno tiam prezentas seriozan sukceseblecon. Efektive, oni ne forgesu, ke la Gibraltara tunelo kaj la konstruo de fervojo Tanger-Dakar kreos la plej mallongan vojon por iri de Eŭropo al Sud-Ameriko.

Sufiĉas rigardi mondan karton por konvinkiĝi pri la utileco de la nomita tunelo. Ligante Eŭropon kun Afriko, ĝi ligus samtempe la transkontinentajn fervojojn de Azio kaj Eŭropo al la nun projektataj trans-Afrikaj fervojoj. Dank' al ĝi oni povus fervoje trairi tri kontinentojn. Trajno kondukus de Moskvo aŭ eĉ de Pekingo al Tanger; Kongolando estus je kvin tagoj de Bruselo, kaj la vojaĝo de Parizo al Dakar postulus nur tri tagojn. De Londono oni, uzante la tunelojn de la Kanalo kaj de Gibraltar, povus veturatingi Transvaalon en *sep* tagoj, sen vagonŝanĝo. Sed pli facilaj estus ankaŭ la komunikoj kun Sud-Ameriko, ĉar de Dakar estus aranĝata rapida ŝipservo al la gravaj urboj de Sud-Ameriko (inter Dakar kaj Pernambuco, en Brazilo, la distanco estas nur 2300 km, t. e. malpli ol la duono de la distanco inter Nov-Jorko kaj Liverpool). Oni povus veturi de Parizo al Montevideo kaj Buenos-Aires en *ok* tagoj, de Parizo al Santiago en Ĉilo, dank' al la trans-Anda fervojo, en *dek* tagoj.

La realigo de tiu projekto necesigas gravajn laborojn, nome la konstruon de la Gibraltar-tunelo, la starigon de fervoja linio inter Tanger kaj Dakar, la modernigon de la Hispana fervojaro kaj fine la instalon de granda komerca haveno en Dakar. Tiu tre vasta programo kompreneble postulus grandajn elspezojn kaj prezentus seriozajn malfacilaĵojn. Sed la entrepreno ŝajnas realigebla, se oni vokas la helpon de la financistoj kaj inĝenieroj de la landoj plej interesataj je la projekto.

Ni unue konsideru la konstruon de la tunelo. Ĝi estos nek pli, nek malpli komplika ol tiu inter Calais kaj Dover. Seriozaj studoj estas jam faritaj. La Hispana Komitato por la Gibraltar-tunelo akceptis projekton de G-lo Rubio y Bellue. Laŭ ĝi, la tunelo ne estus konstruata en la malplej larĝa parto de la markolo por eviti la tro grandan profundon ĉe tiu loko. Ĝi estus longa je 38 km; la deklivo ne superus 25 mm po metro kaj la maksimuma profundo estus 373 m sub la marnivelo. La tunelo konsistus el sola tubo kun diametro de 5,50 m kaj unu vojo; en tri lokoj, la vojo duobliĝus por ebligi la pasadon de du trajnoj ĉiudirekten. La problemo de la premo estas zorge studita. Bazante sin sur la teorio de Wissemann, S-ro Rubio y Bellue konkludis, ke la akvotavolo ne malebligos la tunelon. Oni kalkulis, ke la temperaturo maksimuma atingus 27° en la plej profunda parto. La Studa Komitato ankaŭ esploris la problemon pri la plej oportuna borado. La plej modernaj procedoj spertitaj ĉe la borado de la Alpaj tuneloj estus uzataj. Ĉar ĝi havus nur unu vojon, la Gibraltar-tunelo kostus malpli kare ol la tunelo Calais-Dover, kvankam la naturo de l' subgrundo pligrandigos la malfacilaĵojn de la borado. Laŭ la bazo de la kostoj por la Alpaj tuneloj, oni taksas la elspezojn je 300 milionoj da frankoj.

Cetere, oni ne devas rigardi la konstruon de tunelo kiel tuj gajnigan operacion. La amplekso de la projekto tre superas la mallarĝan limon de financa entrepreno; ĝi koncernas la ekonomian estontecon de tri grandaj landoj. Ĉar la Gibraltar-tunelo estas iel ligata kun la tunelo sub la Kanalo, la Hispana Komitato atendas pri tiu lasta la decidon de la Franca kaj Brita registaroj, antaŭ ol daŭrigi siajn laborojn.

La projekto verkita de Franca inĝeniero Bressler iom diferencas de la Hispana. Laŭ ĝi oni konstruus tunelon kun duobla galerio, kiel sub la Kanalo, unu por la irantaj, alia por la revenantaj trajnoj. Aliparte, la markolo estus trairata ĉe la plej mallarĝa distanco, sed pro tio la profundo atingus 820 aŭ 840 m sub la marnivelo. Cetere, la aŭtoro de tiu projekto konsentas, ke, se la rekta linio ŝajnas la plej racia, oni tamen nenion povas decidi antaŭ scienca esploro de la markolo. La fundo estas ŝtonplena kaj malebena; ĉe kelkaj lokoj la profundo atingas 1000 m.

Alia kondiĉo por la realigo de la projekto estas modernigo de la Hispanaj fervojoj. Hispanio estas, kun Rusio, la sola Eŭropa lando, kie la normala vojlarĝo ne estas ankoraŭ akceptita (la Hispana larĝo mezuras 1,40 m). Pro tio, la Francaj vagonoj ne estas uzeblaj sur la Hispana teritorio, nek la Hispanaj sur la Franca. Oni devus do instali normalan vojon sur la tuta Hispana fervojaro, se oni volas starigi tute rektan linion de Francio al Maroko. La Hispana Senato definitive voĉdonis, en februaro 1919, fervojan projekton por kunligi la Francan landolimon kun Algesiras; tio estas parto de la linio projektita de S-ro Bressler. En la projekto de S-ro Rubio y Bellue la tunel-eniro troviĝas ĝuste en Algesiras.

La tria verko estas la konstruo de fervojo de Tanger al Dakar. Ĝi trapasus parton de okcidenta Afriko, laŭeble rektlinie, kaj estus longa je 3000 km. Oni ofte kredas, ke la konstruo de fervojo tra dezerto estas malfacilega. Tio estas eraro. La laboroj tiom pli rapide efektiviĝas, ke la konstruaĵoj, kiel pontoj, tuneloj, k. s. estas tre maloftaj. En la stepoj de Manĉurio, ĉe la Siberia kaj Transvaala fervojoj, oni sukcesis alfiksi 11 km da reloj tage.

Fine, la projekto Bressler ankaŭ antaŭvidas instalon de komerca haveno en Dakar. Dank' al sia grandega kaj profunda golfo, sia bonega situacio, relative proksime de l' Sud-Amerika kontinento kaj de l' Panama-kanalo, Dakar, fervoje interrilatigota kun Eŭropo, fariĝos grava haveno.

La tunelo sub la Kanalo, tiu de Gibraltar, la modernigo de la Hispanaj fervojoj, la linio Maroko-Senegalio, la aranĝo de la Dakar-haveno estas tutaĵo de kunligitaj problemoj, kiujn oni ne devas unuope pristudi. La signifo de la tunelo inter Calais kaj Dover estas jam sufiĉe demonstrita por ke, eĉ limigita je la vidpunkto de la Franco-Britaj rilatoj, ĝia realigo ŝajnas necesa kaj urĝa. Sed pri la aliaj projektoj, ne estas same. Se oni ĉiun aparte ekzamenas, oni ne tuj vidas ties signifon; sed se oni ekzamenas ilin kune, oni konstatas, ke el ilia kunrealiĝo rezultus tre efika pliboniĝo de la ekonomia stato de Eŭropo.

Laŭ *Georges Houard.*
Trad.: *A. R.*

Al niaj abonantoj

La proksima numero de „Esperanto“ julio-aŭgusto eliros la 15 julio.

SOCIA VIVO

Persio[1]

II

Oni ofte diras, ke la Persa registaro sidas en nordrando de la regno kaj regas — per telegrafdrato. Ĉu estas mirige, ke la Ŝah-in-Ŝah, la Reĝo de ĉiuj Reĝoj, devis lasi la lokan potencon en la apartaj provincoj al la Bahtiarĉefo, ĉefrabisto aŭ kamelŝtelista reĝo, kiu donas al si la grandan honoron, fari kun li traktaton. Super tio oni altrudis al li „liberelektatan“ parlamenton, kies naciaj, demokrataj k. t. p. partioj estas ja nur konsciaj aŭ senkonsciaj iloj de la Eŭropaj intrigoj, kaj kial tiuj intrigoj? Tre simple: tiu ĉi lando, sen ŝoseoj kaj fervojoj, estas politika vojo. Persio estas viktimo de sia geografio: ĝi limas kun Mesopotamio, estas hinterlando de la Bagdadvojo, limas kun Rusio, fine kun Afganistano kaj Beluĉistano, la Anglaj glacisoj de la Hinda imperio! Pro Hindio ĝi venis inter la Rusa kaj Brita muelŝtonoj.

En 1907 Anglio kaj Rusio, instigataj de reĝo Eduardo, decidis likvidi siajn malkonsentojn kaj alveni al ĝenerala akordo. La delikata punkto estis en Persio. Sub ŝajno de divido de Persio en du influzonoj, unu Rusa norde, alia Brita sudoriente, Anglio en realeco fordonis la pliinfluon al sia konkuranto. Superaj interesoj pri aliaj globpunktoj devigis ĝin fari koncesiojn al Rusio kaj, por malhelpi la Kozakojn manĝi tutan Persion, ĝi rezervis almenaŭ sian parton, tiun, kiu tuŝas la Persan golfon kaj Hindion. Pli malfrue Germanio ricevis sian parton en la centra zono, kiun la akordo de 1907 antaŭvidis kiel speco de bufro inter la Rusa kaj Angla zonoj: per la Potsdama akordo, en 1910, la Berlina registaro konfirmis la rajtojn de Rusio sur Norda Persio, kondiĉe ke la Rusoj akceptos, ke disbranĉiĝo de la Bagdada fervojo atingu ĝis Ĥanikin. Samtempe la Turkoj, instigataj de la Germanoj, ekpostulis Azerbeiĝan'on kaj militokupis grandan parton ... La granda milito venis substreki la mondgravecon de la Irana platajo „grandvojo de l' popoloj“.

Ni revenu al la regado. La plej interesa kaj atentinda estas la Persa kortego.[2] Se oni rigardas nur angulon de ĝi, oni tuj ekvidas la plej grandan luksegon de l' Oriento. La efektiva ĉefurbo de Persio ne estas Teheran, sed la tiel nomita *Ark*, kie kuŝas la kortego de la ŝaho, konsistanta el miloj da korteganoj, kiuj havas ĉiueblan rangon. Dank' al tiu ĉi multnombra korteganaro, oni elspezas milionojn. En la centro de Ark, ĉirkaŭata de reĝaj palacoj, troviĝas *Gulistan* (la ĝardeno de la rozoj). Ĝiaj muroj estas el porcelano, maloftegaj arboj ĝin plenigas, forpelante la varmecon per siaj foliaraj ombroj. Ĝia tero prezentas mirindan tapiŝon el multekostaj floroj. Diafana akvo, sorĉiga muziko, fabela pentrajo! En tiu ĉi maro da verdajo promenadas ĉiutage la estro de Irano, akompanata de aro da luksaj korteganoj, kiuj lin forlasas nur ĉe la sojlo de la *Anderum* (haremo), loĝejo de la milnombra ŝaha edzinaro. Post la morto de lia patro, la ŝaho heredas la tutan haremon, aligante al ĝi sian propran. La ŝahoj ricevadas siajn edzinojn aŭ donace de la korteganoj aŭ alimaniere. La kutimo de la donacoj estas tre disvastigita en Persio kaj tre ŝatata. Ofte la favoro de la ŝaho kaj la ricevanta moŝteco dependas de la donacvaloro. La vizitakceptoj de l' ŝaho estas plenaj de blindiga brilo. La ŝaho sidas sur la trono kun la tiaro plenŝutita per diamantoj. Liaj epoletoj kaj vestajoj brilegas de la smeraldoj, topazoj kaj safiroj.[1] Sub lia frunto estas glorigita diamanto, nomata „La monto de l' mondo“, ĉar plej granda en la tuta mondo.

La kaso de la ŝaho estas ĉiam malplena, tamen lia riĉeco estas grandega. Ĝi konsistas el juvelŝtonoj kaj religiaj objektoj, artajoj kaj diversaj antikvajoj de la fabla Oriento. Ili plenigas la salonojn kaj ĉiujn angulojn de la reĝa palaco. La plej valora estas la karto de la mondo, farita el pura, brila oro, kaj sur kiu ĉiu lando estas videbla per multekostaj ŝtonoj. Persio kaj Teherano estas montritaj per grandaj diamantoj. Tie troviĝas ankaŭ la famekonata antikva libro „Ora trono“, kies desegnajoj estas faritaj ankaŭ el multvaloraj brilantoj kaj juvelajoj.

La registaro estis tute aŭtokrata, sed ĝia despotismo estis mildigata per la manko de centralizeco kaj la kvazaŭsendependeco de la provincaj regantoj. Tio ĉi permesis sin forsavi de la tiraneco transportante sin en alian regionon, regatan pli milde. La „ŝariato“ aŭ religia leĝo aplikata de la Molahoj kaj la „urfo“ aŭ civila leĝo, kiu estis nur kolekto de la metodoj, kiujn ĉiu guberniestro laŭplaĉe alprenis por subteni sian aŭtoritaton, ekzistis flanke ĉe flanke sen starigo de korelativeco inter ili. La kruelaj punoj, inspirataj de la venĝemo kaj konsistantaj el premego de l' piedoj en „falaga“, meto de akraj ŝtonoj inter la manfingrojn kaj kunligo ĝis disŝiriĝo, enpuŝado de akrigita kano sub la ungojn, batado per vipetoj, surverŝo per bolanta akvo, ensakigado kun kato kaj hundo, fortranĉo de la manoj, oreloj, nazo, gorĝo, subgenuoj, pendigado, enmurigo[1] kaj aliaj rememorigantaj la barbarajn epokojn, komunuzaj en la komenco de la regado de Nasir-ed-Din, preskaŭ malaperis. Ilia malapero devas esti kalkulata inter la feliĉaj konsekvencoj de la vojaĝoj de l' ŝaho en Eŭropo (en 1873, 1878, 1883 kaj lastatempe), kiuj donis al li la deziron esti konsiderata kiel klera suvereno kaj lin faris tre sentema al la Eŭropa opinio. Li estis abonita je gazeteltranĉajoj kaj tradukigis al si persen ĉion, kio aperis pri li en la Eŭropa gazetaro, de du malsamaj tradukistoj, por esti certa, ke, en okazo de malagrabla por liaj reĝaj oreloj legado de tiuj eltirajoj, la enhavo ne estis pro tio tro modifita.

Ĉiuokaze tiuj vojaĝoj en Eŭropo havis ankaŭ malpli feliĉajn konsekvencojn. Ili kreis la bezonon de konsiderindaj monsumoj, kaj „esti kapablaj elpagi“ fariĝis, pli kaj pli, la ĉefokupo de la ŝahaj ministroj. Diversaj sindikatoj, embuske atendantaj koncesiojn, prezentis al ili facilan sed pereigan rimedon, kaj la ŝaho komencis, en 1880, senpripense hipoteki al fremduloj kaj je ruinegigaj kondiĉoj, la naturajn vivrimedojn kaj la neekspluatitajn riĉajojn de sia lando. Unu el tiuj koncesioj, tiu pri la tabakoj, donita en marto 1890 al Angla kompanio, estas speciale notinda, ĉar ĝi estis unu el la senperaj, kvankam malproksimaj, kaŭzoj de la konstitucia movado, kaj ĉar la Persoj kontraŭstarigis tiam, unuan fojon, sian kolektivan volon al la volo de la ŝaho kaj de ĝia kortego. Komercistaj deputataroj prezentis petskribojn al la ŝaho pri la repreno de la koncesio kaj maltrankviligaj popolaj manifestadoj okazis; fine la religia estraro publikigis „fatva“ aŭ edikton deklaranta kontraŭleĝa la uzadon de l' tabako, ĝis kiam la koncesio ne estos nuligita. La popolo submetiĝis al la edikto kun rimarkinda unuanimeco; apenaŭ oni vidus fumi publike pipon aŭ cigaredon, la virinoj denuncis tiujn el siaj parencoj, kiuj kaŝe fumis, kaj la ŝaho mem sin vidis subite senigita de sia tabako. Ĉe tiuj kondiĉoj, la koncesio perdis ĉiun valoron, kaj, post longa lukto, ĝi estis nuligita en 1892, interŝanĝe de kompenso da 500,000 l. sterlingoj konsentita al la koncesiuloj, kaj kies sumon la registaro devis prunti je 6 % de la Imperia Banko de Persio, kiu estas Angla. Tiu ĉi malfeliĉa negoco havis gravajn konsekvencojn: ĝi naskigis la Persan nacian ŝuldon, malfermis la okulojn de l' popolo pri ĝia forto, kaŭzis la mortigon de Nasir-ed-Din . . .

---

[1] En la komenco de la artikolo pri Persio, aperinta en la maja numero, enŝoviĝis preseraro: La loĝantaro superas 15 milionojn. Notinde, ke ĝis antaŭ nelonge la virinoj ne estis enkalkulataj.

[2] V. „Persaj Skizoj I“, Esp. broŝureto de G. Davidov.

[1] V. plie en „Persaj skizoj II“, de G. Davidov.

Se oni ignoras tiujn ĉi malproksimajn kaŭzojn, oni ne povas kompreni la naturon kaj la kaŭzojn de la revolucio, kaj kial popolo kiel la Persoj, kiuj dum sia historio ĉiam pruvis rimarkindan fidelecon al siaj reĝoj (ŝah-parasati), povis subite postuli konstitucian reĝimon kaj parlamenton, nek kial la movado, laŭesence pli naciista ol demokrata, vekis, precipe ĉe la junuloj kaj virinoj, tiel intensan entuziasmon. Oni devas scii, ke tio estas la tiraneco pliigita de la malkapableco, ekstravaganco kaj la manko de patriotismo, kiujn la popolo ne povis elporti; kaj se ĝi volis konstitucian regadon, tio estas ne tiom pro la reĝimo mem ol pro tio, ke ĝi vidis la urĝan necesecon krei pli decan, pli kapablan kaj pli patriotan registaron ol la antaŭa, kiu ĝin vendis kaj tute malzorgis la prestiĝon kaj la sendependecon de la lando. Oni devas rimarki, ke la popolo postulis unue nur superan juĝistaron por ĝin protekti kontraŭ la arbitreco, kaj nur pli malfrue ĝi postulis parlamenton kaj konstitucion. La Perso ne volis plu esti ludilo en la manoj de l' ŝaho, elmetata al la arbitra tiraneco de ĉiu loka guberniestro kaj de ĉiu impostokolektisto, povante alvoki al neniu leĝo, postuli justecon al neniu juĝisto . . . Ĝi volis fariĝi homo havanta rajtojn kiel devojn kaj esperojn kiel timojn. La revolucia movado en 1906 havis malantaŭ si la sinceran apogon de la plej bonaj elementoj de la Persa nacio, entenate la tiel fundamente konservativan klason de la Molahoj kaj Ulemoj aŭ doktoroj de teologio, ofte malĝuste nomataj pastroj, kio estas eble la plej frapanta fenomeno de la revolucio.

Oni devas rimarki, ke en Persio eĉ la internaj luktoj, kiuj ŝajnas kiel partiaj luktoj, estas en realeco ĉapitroj de la eterna lukto de l' Irananoj kontraŭ la Turananoj: la nuna dinastio de Kadĵaroj estas de Turka raso kaj lingvo; la partioj, kiuj faris la revolucion en 1906, kaj kiuj estas partianoj de la konstitucio, estas plejparte Irananoj, Iranigitaj Turananoj, Armenoj — urbburĝoj, komercistoj, ekleziuloj kaj leĝdoktoroj, de Persa raso kaj lingvo, eminentularo, kiu ricevis Eŭropan kulturon, aŭ kiu formiĝis en ŝiitaj Muslimaj universitatoj. Kontraŭ ili la Rusoj subtenis la dinastion kaj absolutismon, kaj la Angloj, post la akordo de 1907, ĉesis ilin subteni.

La unua nacia konsilantaro devis precipe, dum la dudek monatoj de sia ekzisto, interbataliĝi kontraŭ la intrigoj kaj la perforto de ŝaho Mohamet-Ali, de kiuj ĝi estis venkita, kaj nur la dua konsilantaro, elektita post lia detronigo, havis reale la okazon por fari restarigan politikon. Ĝi havis kiel tujan programon la plibonigon de la financa situacio de la lando, la reaĉeto de la riĉaĵoj tiel senpripense ŝuldigitaj de pluraj ŝahoj kaj la kreon de militforto necesa por subteni la ordon. La Persa armeo estis sub Rusa instruo; ĝi konsistas el regulaj trupoj *(nizam'oj)* kaj malregulaj *(redif'oj)*. La hierarĥio estas kiel ĉe la Turkoj, kaj la soldatoj sin ligas dum la tuta vivo kaj ricevas salajron tre malregule pagatan. La ĝendarmaro estis longe komandata de Svedaj oficiroj. La Armenoj donis la plej bonan generalon el la parlamentaj fortoj en la personeco de Jeprem Ĥan kaj unu el la plej aŭskultataj konsilantoj, la malfeliĉan Bedros Andressian, pendigita de la Rusoj en 1912, unu el la du personoj sciantaj la sumon, je kiu altiĝas la juveloj de l' Persa krono. Kaj Usono liveris la unuagradan kaj tre ŝatatan financiston, Morgan Ŝuster, kun la necesa personaro. La ŝtata maŝino komencis moderniĝi, kaj la situacio de Persio ŝajnis pliboniĝi, kiam eksplodis la mondmilito . . .

(Daŭrigota.) *Iv. H. Krestanov.*

NOTOJ

.˙. **La minimuma salajro.** — La ideo leĝe fiksi minimuman salajron venas de Aŭstralio, unue de la ŝtato Victoria. La publiko ofte kredas, ke la minimuma salajro estas starigita de la ŝtato. Tio iatoje okazas. Kelkaj Aŭstraliaj ŝtatoj fiksis leĝan minimuman salajron (2 ŝilingoj 6 pencoj ĝis 4 ŝilingoj tage antaŭ la milito), kiun rajtis ĉiu laboristo havanta normalan kapablon. En 1917 Brita leĝo fiksis je 25 ŝilingoj semajne la salajron de la terlaboristoj; en la sama jaro, la Svisa registaro decidis minimumajn salajrojn en la brodindustrio.

Sed plej ofte la minimumajn salajrojn fiksas ne la ŝtato, sed la interesuloj mem. Tiel estas, ekzemple, la leĝaro de la Aŭstralia ŝtato Victoria: En la diversaj profesioj oni kreas salajrkomitatojn, kies kompetenteco rilatas al difinita urbo aŭ distrikto. Tiuj komitatoj konsistas egalnombre el dungantoj kaj dungatoj sub la prezido de eksterpartiuloj. La membrojn elektas la registaro aŭ la interesuloj mem. Tiuj komitatoj mem fiksas la minimumajn salajrojn.

La unuaj salajrkomitatoj estis kreataj en ŝtato Victoria dum 1896; ili okupis sin tiel pri la fabrika kiel pri la hejma laboro. Sekvis la ekzemplon South Australia en 1900 kaj Queensland en 1908. De post 1911, kelkaj Usonaj ŝtatoj sekvas la saman vojon. En 1918 Argentino kreis salajrkomitatojn nur por la hejma laboro, kaj la ŝtato Quebec en Kanado decidis, en 1919, krei komitatojn por fiksado de minimumaj salajroj por virinoj. Meksiko en 1917 akceptis pli vastan leĝon, laŭ kiu komitatoj fiksos minimumajn salajrojn por ĉiuj gelaboristoj okupataj en industrio, komerco kaj terkulturo.

En Eŭropo, la minimuma salajro estas unue enkondukita en Brition. En 1909 leĝo kreis salajrkomitatojn por kelkaj fakoj de la hejma laboro. En 1912 la sama principo estis aplikata al la ministoj, en 1917 al la terlaboristoj kaj en 1918 salajrkomitatoj estis kreataj en la industrio por sesmonata daŭro por malhelpi la malaltiĝon de salajroj post la malmobilizo.

Francio en 1915, Norvegio kaj Aŭstrio en 1918, Svisio en 1919 sekvis tiujn ekzemplojn, starigante salajrkomitatojn por protekti la hejmlaboristojn.

.˙. **La batalo kontraŭ la teredo.** — La teredo[1] estas molusko, kiu kaŭzas multe da malbono al la ŝipoj ĉe la marbordo. Ĝi fiksiĝas kiel larvo ĉe la lignaj partoj de la ŝipoj, traboras la lignon kanalsimile kaj iom post iom detruas ĝin. Tiu ĉi molusko detruas marbordajn konstruaĵojn, alirajn pontojn kaj aliajn lignajn konstruojn de la marborda gardado. Por kontraŭbatali tiun malutilan beston oni eltrovis impregnon de la ligno, sed ne ĉie sukcesis. Laŭ la „Scientific American“ Ch. F. Lockwood donas novan procedon. Ĉirkaŭ la palisoj estas metataj feraj ringoj portataj per ĉenoj kaj dratoj de naĝantaj lignoj, tiel ke ĉe la akvosupraĵo ili ĉirkaŭas la palison kiel florkrono. La suba ringo dum refluo devas alveni ĝis la fundo. Pro la efiko de la tajdo kaj la mara moviĝo la ringoj estas daŭre altigataj kaj malaltigataj, tuŝas konstante la palison kaj malebligas al la teredoj fiksiĝi. Provoj estis faritaj sub kontrolo de la Kalifornia havena komisario proksime de San Francisco; oni fiksis kelkajn palisojn, el kiuj unu estis preparita laŭ la Lockwood procedo. Post certa tempo oni reprenis la palisojn, konstatinte, ke la lasta restis sendifekta dume la aliaj estis plene detruitaj per la teredo kaj aliaj borantaj vivaĵoj. — Trad.: *Hansjakob.*

.˙. **Malapero de la kelnera frako.** — La Svisa unuiĝo de hoteloficistoj klopodas forigi la luksan, ĝenan kaj multekostan frakon kaj anstataŭigi ĝin ĉu per nigra alpaka jaketo aŭ blanka bluzo. La prezidanto de la Berna sekcio nun studas modelojn de la projektata vesto.

---

[1] Angle ship-borer; France taret; Germane Bohrmuschel; Itale teredine; zool. Teredo navalis.

LITERATURO

El miaj reĝaj interrilatoj

De **Jan Havlasa**

Jan Havlasa (* 1883) — nuntempe konsulo en Peking — estas unu el la plej atentindaj verkistoj de la Ĉeĥa nacio. Lia denaska inklino al ekzotikeco instigis lin travojaĝi Japanion, Malajion, Oceanion kaj Usonon. Por siaj ĉarmastilaj romanoj kaj noveloj li elektas temojn seriozajn, ofte mistikajn; sed la vojaĝopriskribojn li traplektas volonte per gaja, freŝa humoro. Jena mallonga rakonto estas ĉerpita el la libro „Svetla dalekych prístavu" (Lumoj de malproksimaj havenoj, 1916)

Ankaŭ mi interrilatis, mi petas, kun personoj reĝosangaj. Mi ne parolas pri la diversaj reĝidinoj el la Senventa Insularo, kiuj en Papeete, la ĉefurbo de Tahiti, priservadis gastojn en ĉiu el la tri tieaj hoteloj. Rilatoj kun tiuj povis ja eventuale havi neagrablajn sekvojn, kiel okazas ordinare, se oni ne balaas, kie aliaj antaŭe tagmanĝis. Miaj reĝaj konoj ampleksas interalie eĉ efektivan suverenon, la estron de Kelantan, Lian Sultanan Moŝton Snikon la unuan — kaj lastan, ĉar Kelantan, Malaja sultanlando limtuŝanta Siamon, verŝajne baldaŭ fariĝos Brita kolonio. Mi ŝuldas al li ankoraŭ kopiojn de fotografaĵoj, kiujn mi faris laŭ lia deziro en liaj ĝardeno kaj vilao en Kota Bharu, la ĉefurbo de Kelantan. Sed el ĉiuj reĝaj konatoj plej ofte mi rememorigas al mi princon Hinoi, adoptitan filon de la lasta Tahitia reĝo Pomare, mi ne plu scias la kioma . . .

Pli gajaniman mienon mi ne vidis en mia vivo, nek dikan korpon portatan kun pli granda gracieco. Li estis ja vera giganto, kaj en lia kuprokolora vizaĝo nigre brilis okuletoj plenaj de bonhumoro. Krom la Tahitiana humorsento li havis ĉiam ankaŭ malfalsan Parizan spriton je dispono; jes, eĉ tiel ofte kaj tiel longe li estis vivinta en Parizo, ke li sciis konduti kiel pursanga Parizano. Liaj anekdotoj kaŭzis ĝuon ne nur per sia stilo, sed ankaŭ per la rakonta maniero; la nuancoj de lia voĉo, la elokventeco de lia gestado kaj la artifikeco de liaj ŝercopikoj dissemadis infektan gajecon. Kiam li rakontis, kiel li volis kun amikoj nokte enterigi sian plej karan, mortintan kamaradon, kaj kiel ili irante al tombejo kaj estante iomete ebriaj pretervole perdis la seniluziigitan kadavron en la mallumo de palma arbaro — ni kurbiĝis pro rido, dum en lia fizionomio eĉ ne unu trajto sin movis. Sed lia bonhumoro ne estis sole laŭlitera; li ĝin efektive travivadis. Oni sciis pri li, ke du procesantojn de sia distrikto li foje forsendis el la juĝejo hejmen, plene ilin kontentiginte per Salomona verdikto: „Finan decidon aŭdos ambaŭ partioj okaze de la Lasta Juĝo". Ne estas necese rimarkigi, ke princo Hinoi estis ateisto, kiel decas kaj konvenas al ido de dioj.

Sed venis ankaŭ vico de la reĝido Hanoi, de la princo-spritulo . . . Fine de mia restado en Papeete penetris eĉ tien la unua kinematografo, kaj foje vespere vizitis la prezentadon ankaŭ ni kun amikoj. Okazis, ke mia edzino troviĝis sur sidloko inter du dikventraj gigantoj, mia bona amiko Tetuanui, estro de la distrikto Mataiea, kaj princo Hinoi, kiu klopodis esti kiel eble plej amuza. En la duonlumo mi ekrimarkis, ke ambaŭ Tahitianoj parolis de sur siaj altaĵoj en tiun valon inter siaj ventroj, en kiu mia edzino malaperis sen postsigno. Sed kiam la filmo venis ĝis la fino kaj lumo denove plenigis la ejon, mi eksaltis surprizite. Estante inter la du grandeguloj kunpremita, la edzino ŝajnis esti ruinigita sur la seĝo, kvazaŭ amaseto da vestaĵoj . . . Ankaŭ du aliaj amikoj eksaltis, la ĝendarmejestro kaj D-ro Ŝtefánik[1] . . . „Kio okazas?" ni ĉiuj havis surlipe . . .

Kaj poste nin ĉiujn ekkaptis ridego, en kiu partoprenis tiufoje ankaŭ princo Hinoi. Ĉar tio, kion ni vidis, ne estis spritaĵo de la princo, sed spritaĵo *pri* la princo . . .

Mia edzino ĉe tiu reĝa amuzo simple . . . ekdormis. —

El Ĉeĥa lingvo trad.: ***Miloš Lukáš.***

---

[1] D-ro Milan Rastislav Ŝtefánik, Slovaka astronomo, poste generalo kaj la unua militministro de la Ĉeĥoslovaka respubliko, kiu en majo 1919 tragedie mortis (ĉe aeroplana akcidento), loĝis tiam sur Tahiti kaŭze de astronomiaj observoj.

Tri tomboj

Tatara[1] legendo el Krimio

Li kreis vivon kaj morton
por vidi, kiu el ni agos pli bone.
Li estas ĉiopova! (Li, dio, Alla.)
(Koran, LXVII, -2

Altege sin levas ruĝaj krudrokoj en mallarĝa, profunda valo. Estas silente tie — oni aŭdas nek homan voĉon, nek kanton birdan — sole apenaŭ murmuretas rivereto, fluadante sur ŝtonetoj. Ĝi estas rivereto de larmoj. Ĝin nutras larmoj de homaj suferoj; de jam longe trafluis ĝi valon de doloro, sed ĉiam restas ĝia akvo profunda — eble ĝis nun ĝi ne malsekiĝis.

En valo kuŝas tri tomboj, kies suproj estas kovritaj de ŝtonoj ĉalmaj (*ĉalmà* = kapvesto de tataraj viroj).

* * *

De jam longe en ĉefurbo de Ĥanoj loĝis terura, militema ĥano el potenca dinastio de Lirej. Timiga estis tiu ĥano ne nur por siaj vasalobejoj (*bej* = princo), tremis antaŭ li ankaŭ kuraĝaj grekoj kaj maltimemaj ĝenovanoj. Palaco ĥana staris en ombroplena, granda ĝardeno; tie floris rozoj, asalioj; bonodoris magnolioj, oleandroj; ruĝiĝis granatpomoj tra verdaĵo de mirtarboj; kvazaŭ gardistoj sin levis altaj, malhelaj cipresoj. Estis multe da mirindaĵoj en ĥana ĝardeno: grotoj el kristaloj, belaj fontoj, diverskoloraj birdoj. —

Sed la plej bela ornamaĵo de ĥana palaco estis tri ĥanaj filoj, belaj nigrokulaj ĥanidoj. Ĥano ege amis ilin kaj kutime ludis inter ili, kiam li ne militis.

Sed, laŭ proverbo, ne estas mielo sen maldolĉaĵo, ne sin trovas herbo sen serpento, ne serĉu perfektan feliĉon sur tero!

Unufoje ĥano atakis malgrandan grekan vilaĝeton; li ordonis al siaj *„ulanoj"* (garda regimento-*ogli, oglanoj*-filoj, fraŭloj) bruligi vilaĝeton. Subite sur la tegmento de brulanta domo ekvidiĝis maljuna virino, kiu kriis al ĥano: „Vi estu malbenata pro Dia nomo! Viaj infanoj per iliaj suferoj kompensos vian malbonegon!"

Kaj ŝi sufokis en fumo de brulego. Neniu povas sin kaŝi de malbeno. Unufoje, belaj ĥanidoj ludis en patra ĝardeno; subite ili sin trovis en dezerto; nek loĝejo, nek homoj. Infanoj komencis plori, sed baldaŭ ekdormis, ĉar estis jam nokto. Matene ĥanidoj ekvidis, ke ili sin trovas en mallarĝa valo, en fino de tiu-ĉi valo ili ekvidis belan ĝardenon. Ili restis tie, ĉar ili laciĝis kaj ne povis trovi vojon hejman.

Tie vivis tri ĥanidoj tiel longe, kiom da tempo nur Ala pri tio scias. Ili kuŝis sub arboj, manĝis ovojn, fruktojn, trinkis malvarman akvon el monta rivereto. Ĉiuj bestoj kaj birdoj alvenis al ili ne timante ilin. Ĥanidoj amis naturon; ĉio igis ilin glori Ala (Alaĥon): ĉu lumigis mateno per rozaj radioj ebenaĵon, ĉu forflugis blua nebulo je sunsubiro, kaj unu post alia ekbrilis steloj en smeralda ĉielo, ili genuflekse preĝis kaj gloris Ala.

Ili venis en valo de doloro, kien homoj alportis malsanulojn. Tie malfeliĉuloj mortis, ĉar ili estis tro malsanaj kaj sanuloj timis ilin. Sanaj ĥanidoj ne forlasis malsanulojn. Ofte dank al ilia flegado, la sano revenis en korpon de malsanuloj; tiuj, al kiu Ala jam sendis anĝelon de l' Morto[2], forlasis vivon preĝante kun kredo je homa boneco.

Bonaj fratoj estis konataj ĉie: oni venadis al ili kun ĝemoj kaj ploroj; ili konsolis ofte suferantojn per bonaj vortoj kaj preĝo, ofte kuracis per mirindaj herboj. Iuj nomis ilin sanktuloj, kaj ilia famo venis ĝis ĥana palaco. Unufoje sendis Ĥano por serĉi la homojn, pri kiuj li aŭdis. Jam li estis tre maljuna kaj mortanta. Oni kondukis ĥanidojn al ilia patro.

---

[1] Tataroj — nun laborema, paca popolo, Mohamedanoj, iam batalis kontraŭ aliaj popoloj de Krimio; la bordoj de la Maro Nigra (*nigra-turke-kara*-signifas, ankaŭ malbona, kolerema) estis popolitaj de kolonianoj el Grekio kaj Genovo.

[2] Laŭ Korano, Ala sendas anĝelon de l' Morto, kiu per ekbato de sia glavo mortigas homojn.

En granda ĉambro de marmora palaco, sur silkaj kusenoj kaj belaj turkaj tapiŝoj kuŝis malsana potenculo. Li estis ĉirkaŭita de bonodoraj floroj; sur marmora muro malsuprenfluis murmuretante malrapidaj, malvarmaj larmoj de l' fonto[1].

Sola kuŝis iam terura princo — lin forlasis multe da korteganoj, foriris bej, sin kaŝis belaj edzinoj, obeemaj „ulanoj“; ĉiu forgesis la donacojn de Ĥano kaj memoris, ke li estis malbona, despotema. Tri fratoj, enirante, ekvidis anĝelon de l' Morto ĉe lito de Ĥano, anĝelo, preta laŭ ordono de Ala, trapiki lian koron per glavo.

En tiu-ĉi momento Ĥano ekkonis siajn filojn, kvankam ili fariĝis maljunulaj, li ekvidis ilin — kiel antaŭ — belaj, nigrokulaj junuloj. Tuj ĥanidoj ekkonis ankaŭ patron kaj ploregante sin ĵetis apud la mortonto.

Diris tiam al anĝelo de l' Morto Ala: „sufiĉe vidis ili homan doloron, estas jam tempo al ili ripozi, ili kompensis malfarojn de ilia patro. Alkonduku ilin ĉe mi, en paradizon!“ Anĝelo de l' Morto mole tuŝis iliajn korojn per glavo, kaj iliaj animoj sin ĝislevis al Ala.

Honore ilin oni entombigis en Valo de Doloro, kie ili longe servis al malfeliĉuloj. Kiel rekompenco Ala donis al ili povon, mildigi homajn suferojn, kuraci ĉiun, kiu venas preĝi ĉe iliaj tomboj.

Alte staras ruĝaj krudrokoj en malluma, mallarĝa valo, silente estas tie, nur rivereto fluadas sur ŝtonetoj, alportante al granda maro larmerojn — de sufero. Ĝi fluadas jam de longe, de longe, sed ĝis nun ne elsekiĝis ĝiaj akveroj.

En valo sin trovas tri tomboj, kun ĉalmoj el ŝtono. Se vi interne suferas, se el viaj okuloj fluas larmoj, se vian koron dismanĝas doloro pro suferoj de proksimulo, venu preĝi tien-ĉi, ĉe tomboj de sanktuloj; preĝu fervore, sincere ĉe du tomboj, tiam vi ekaŭdos el la tria — iomete malproksime kuŝanta — la voĉon solene promesantan, ke via preĝo estas elaŭdita de Ala.

Alexandra Mexin.

---

[1] En ĥana palaco en *Baĥĉisaraj* (-*baĥĉa*-ĝardeno-*saraj*-urbo) ĉefurbo de ĥana regno, oni vidas tiujn-ĉi fontojn de larmoj, akveroj rulas sur muro, unu post alia, kun harmonia murmureto.

La blanka luno

De **Paul Verlaine**

En bosko brilas
La blanka lun',
Branĉ' ĉiu trilas
Mistere nun
Sub tend' folia . . .

Ho, kara mia.

Spegulo luna
De la laget',
Saliko bruna
En siluet',
Kaj ploro venta . . .

Revtemp' silenta . . .

Dolĉmilda, granda
Kvieto-sent'
Estas falanta
De l' firmament'
Kun brilo stela . . .

Ho, hor' ĉiela . . .!

El Franca lingvo trad.:
K. de Kalocsay.

Pri Esperanta literaturo kaj ĝia historio

I

Multaj ofte ne volas konfesi la ekziston de Esperanta literaturo, sub la preteksto, ke nia lingvo ne estas vivanta, kaj pro tio ĝi ankaŭ ne povas posedi literaturon. La pruvo kontraŭa al similaj neĝustaj asertoj estis jam de longe liverata: unuparte de multaj filologoj klarigintaj per diversaj argumentoj la teorian viveblecon de lingvo artefarita, aliparte — kaj ankoraŭ pli bone — de niaj verkistoj mem, kiuj per sia literatura produktado montris praktike, ke Esperanto ne estas lingvo pure meĥanika, sed ankaŭ lingvo de l' animo. Legu la „Espero“, legu „Al la fratoj“, legu „Mia penso“! Ĉu vi ne sentas en tiuj ĉi poezioj la vibradon de homa animo celanta al pli alta idealo?

Tre multe da konvinkaj ekzemploj oni povus eltiri el la praktika uzado de nia lingvo kaj el la historio de la kongresoj, kiu tre evidente pravigis la nutritajn esperojn: sed pro kio ĉiam ripeti la samon? Lingvo povanta perigi la plej intimajn kaj idealajn emociojn de la homa koro rajtas esti taksata pli alte ol simpla ludila kunmetaĵo; ĝi taŭgas esprimi ĉiun postulon de la vivo sambone kiel lingvo nacia, oni devas sekve ankaŭ rekoni ĝian vivopovecon kondiĉatan de tiu fakto. — Kaj, same kiel nia lingvo, vivas ankaŭ nia literaturo, ĉar lingvo kaj literaturo estas du aferoj, kiuj sin intervice kompletigas kaj kune vivadas kaj subiras.

Tamen, spite ĉio, ni ne posedas ankoraŭ sisteman historion de nia literaturo. La tuta ĝisnuna laborado celis nur la pligrandigon de nia libra trezoro, ĉu per tradukaĵoj ĉu per originalaĵoj: oni eble, opiniis, ke la Esperanta literaturo ne atingis ankoraŭ sufiĉan vastecon, por ke oni sin okupu per la studado de ĝia historio. — Du estas tie ĉi la ideoj facile konfuzeblaj kaj tamen interalie tre malsamaj: la historio de nia lingvo kaj tiu de nia literaturo. Jam antaŭ la monda milito aperis verkoj bonegaj pritraktantaj la disvastiĝon de Esperanto kaj la evoluon de nia tuta movado. Oni donu, ekzemple, malgrandan rigardon al la „Historio de Esperanto“ de Zakrzewski: oni legas en ĝi la nomojn de la unuaj fervoraj batalintoj por nia lingvo; post la rusa kaj franca periodoj, plenaj da mokado, sed ankaŭ da persistemo kaj fido, oni trovas la (bedaŭrinde tro resuman) priskribon de l' gloraj Esperanto-Kongresoj; sed vane ni serĉus detalan ĉapitron pri nia literaturo. La tiurilataj mallongaj rimarkoj tuj vidigas al ni, ke la aŭtoro celadis prezenti en formo sistema la sukcesojn nur de l' propagandistoj, sed ne de la verkistoj. Tiu ĉi lasta parto estas kontraŭe la tasko de nia literaturhistorio, ĉar preskaŭ malatentante la disvastiĝon de nia lingvo, ĝi sole temas la ordigon kaj la kritikan pritrakton de la tuta amaso da verkoj, kiujn ni jam en la plej diversaj fakoj posedas.[1]

Oni povus tie ĉi fari al si la demandon, ĉu la verkado de historio de nia literaturo estus ankaŭ efektive rekomendinda kaj povus havi ian gravecon por la evoluo de nia tuta movado. Mi kredas, ke oni devas nepre jesi la demandon. Ĉar, kiajn ilojn havas nuntempe je sia dispono Esperantisto deziranta havigi al si ordigitan konon de nia tuta libraro?

Tiurilate ni posedas ĝis nun tre mizerajn presaĵojn, kiujn ni povas laŭspece dividi en tri kategoriojn.

Al la unua apartenas ĉiuj artikoloj dissemitaj en multaj eldonaĵoj (propagandaj broŝuroj, demandaroj). Ili estas ĝenerale destinataj por personoj varbotaj al nia afero kaj havas ankaŭ pro tio nur la taskon atentigi pri la graveco de nia literaturo kaj pri la granda rolo, kiun ĝi jam ludas en la moderna kulturo: ili do tute flankelasas la problemon de la interna stila valoro de niaj literaturaj produktaĵoj. Sed ankaŭ ne konsiderante la fakton, ke ili tute ne anstataŭas la verkon de mi opiniata, oni povas kviete aserti, ke certe okdek el cent de niaj samideanoj nenion scias pri ilia ekzistado. La Esperantistoj apartenas ĝenerale al tiuj klasoj de la loĝantaro, kiuj ne povas disponi je multe da tempo por eksterprofesia studado, kaj de tiaj personoj oni ne povos pretendi, ke ili profundiĝu en la legado de propagandaj aŭ similspecaj broŝuroj.

---

[1] La mallongaj rimarkoj pri tiu ĉi temo dissemitaj en la plej diversaj propagandaj aŭ similaj broŝuroj estas preskaŭ ĉiam nura registro de l' ĉefaj literaturaj produktaĵoj de Esperanto, kontraŭe ili neniel priparolas la kritikan kaj estetikan parton de la problemo. La parolado „Pri Esperanta literaturo“ farita de D-ro Privat ĉe la Sepa montras per kelkaj trafe elektitaj ekzemploj el nia originala poeziaro, ke nia lingvo ne nur estas plene vivopova, sed ankaŭ posedas, kaj ĝuste pro tio, valoran literaturon. La parolado estas nur defendo de tiu lasta, kaj sekve ne celis esti sistema traktato en la supre dirita senco.

Al la dua kategorio apartenas ĉiuj recenzoj pri nove aperintaj verkoj, represitaj en la plej diversaj periodaj revuoj. Kvankam tiuj mallongaj rimarkoj priparolas la verkojn de kritika — estetika vidpunkto, ili tamen estas preskaŭ sensignifaj por la izola Esperantisto, unue, ĉar ili inter si nenian logikan rilaton posedas, due, ĉar ili estas disigitaj en longa serio da diversaj jarkolektoj, kaj ilia konsultado forprenus tro multe da laboro kaj tempo. Tiaj recenzoj certe liverus dum la verkado de historio de nia literaturo tre atentindan materialon, sed ne povas liberiĝi de la karaktero de pure bibliografiaj rimarkoj.

Al la tria kategorio oni povas aljuĝi la bibliografiajn broŝurojn kaj librejajn katalogojn. Kvankam tiaj skribaĵoj nenion komunan posedas kun la literaturo, ili tamen reprezentas por la komencanto grandan danĝeron estante kutime la unuaj esperantaĵoj venantaj en liajn manojn. En tiuj katalogoj la verkoj estas nur registrataj laŭ titolo kaj prezo, tiel ke oni ne povas fari konkludojn pri ilia vera literatura valoro. La fakto estas tute komprenebla, pripensante, ke la katalogoj estas kunmetitaj laŭ komercaj, ne laŭ literaturaj kriterioj. Mi volas nur atentigi pri la granda danĝero, ke komencantoj aŭ eĉ pli lertaj Esperantistoj uzu tiujn pure komercajn librolistojn kvazaŭ kiel literaturan konsilanton, kaj ke ĉe eventualaj mendoj ili elektu verkojn, kies stilo ne korespondas al la stato de iliaj esperantaj konoj.[1]

Tiuj do estas la solaj skribaĵoj iomete okupiĝantaj pri nia literaturo: materialo, verdire, malsufiĉa. Kaj la fakto, ke oni devas ĝin serĉi tra amaso da libroj, broŝuroj kaj gazetoj, ebligas la formiĝon de klara ideo pri ĝi nur al samideanoj posedantaj jam sufiĉe grandan konon de nia literaturo kaj disponantaj pri riĉenhava kolekto de periodaj esperantaj publikaĵoj. — Tiamaniere ni certe ne alvenos al praktika rezultato. Ĉar ankaŭ supozante, ke oni povus kuntiri la tutan aron da malgrandaj artikoloj, notoj kaj rimarkoj rilatantaj la evoluon de nia literaturo — kiom granda estus tiaokaze la eblo ion forgesi! — oni devus poste preni sur sin la longedaŭran, lacigan taskon de ĝusta disigo kaj envicigo de la fontoj, por eltiri el la tiamaniere ordigita materialo la ĉefpunktojn ebligantajn klaran komprenon de la tuta problemo. Tiu laboro tamen ne povas esti plenumata de homo okupita de matene ĝis vespere per sia profesio, volante ankaŭ supozi, ke li posedus la filologian instruitecon necesan en tiaspeca studado.

Sekve de la diritaj motivoj mi rigardas kiel tre oportuna la verkadon de kritika traktato pri nia literaturo. Similan verkon ni nepre ŝuldas al la kultura graveco akirita de nia lingvo dum la tri lastaj jardekoj en la tuta tielnomata civilizita mondo, kaj ĝi certe estus afablege akceptota de ĉiu entuziasma Esperantisto.

* * *

Ni alproksimiĝas nun al la plej malfacila parto de nia problemo devonte detale analizi la principojn, sur kiuj la tralaborado de la tuta verko sin bazos.

La literaturo de nia lingvo estas io tiel specifa por si mem, ke pritraktado de tiu ĉi demando per malmultaj vortoj fariĝas tute neebla. Momente ni nin devas limigi al la simpla konstato, ke la verko ne devas fariĝi nura librokatalogo, sed kontraŭe kritika priparolado de la verkistoj kaj de iliaj produktoj kun speciala konsidero de la stila-estetika valoro de la lastaj, precipe akcentante la plej gravajn reprezentantojn de nia literaturo, t. e. tiujn, kies verkoj pro pureco de la lingvo kaj perfekteco de la stilo pleje estas konsilindaj al legantoj. Por eviti enuigan amasigon da literaturaj notoj oni devus ordigi la tutan materialon tiamaniere, ke la verko fariĝu samtempe neinterrompa priskribo de l' sinsekva evoluado de nia literaturo. Oni povus tiamaniere oferi ne sole al progresinta samideano, sed ankaŭ al komencanto libron, kiu baldaŭ fariĝus por ili sendube tre dezirata fonto de literaturaj konoj kaj sincera konsilanto en la elekto de iliaj esperantaj legaĵoj.

La detala pritraktado de nia temo postulas precizan ekzamenon de la ĉefaj kaŭzoj, kiuj tiom diferencigas la literaturon de Esperanto de tiuj de la lingvoj naciaj. Por bone determini tiun malsamecon, ni devas respondi antaŭ ĉio kelkajn demandojn rilatantajn al la esenco de ĉiu nacia literaturo; kaj bazante nin sur la gajnitaj konkludoj, ni devos poste pristudi — kvazaŭ per paralela konsiderado — la internan konstruon kaj evoluon de nia literaturo.

Pri la ellaborado mem de la verkota historio mi skribos nur malmulte, limigante min sole al mencio de la du metodoj, kiuj estis uzataj ĝis nun de la scienculoj por la verkado de literaturhistorioj; kaj mi ne donos planon detalan pri la ordigo de l' materialo aŭ ĝenerale pri la enhavo de la verko, ĉar tio ĉi plene dependas de l' personaj opinioj, kaj konforme al la diverseco de la celo persekvata de ĉiu verkanto devas nature aliiĝi ankaŭ la vidpunkto, kiu servas al li kiel bazo dum la tuta laboro; preter tio mi ne intencas min enmiksi nepetite en la privatan agadon de la estontaj Esperantaj literaturistoj.

* * *

Inter la literaturo de iu ajn nacilingva popolo kaj la nia oni rimarkas grandan malsamecon. Malsamaj estis la kondiĉoj, malsama la ejo, malsamaj la homoj kaj la tempo, en kiu nia literaturo kompare al tiuj de la naciaj popoloj disvolviĝis.

Ni devas konsideri tiujn du malsamajn specojn de literaturo de tute apartigitaj vidpunktoj, aŭ, per aliaj vortoj, ni devas uzi por la literaturo de nia lingvo alian juĝmetodon (kriterion) ol por tiu de alia ajn popolo.

Celante nun eltrovi ĉi tiun kriteriaron ni devas reiri de l' efektoj al la kaŭzoj kaj ekzameni la lastajn iom pli proksime. Nun, kiaj estas la kaŭzoj influigantaj la normalan evoluon de la literaturo? Ni troviĝas ŝajne antaŭ konfuzita problemo: efektive estus ankaŭ neeblaĵo klare ekkoni ĉiujn negravajn faktojn, kiuj iel ajn influigis la literaturon, ĉar ili ofte posedas naturon tro subtilan kaj individuan por esti tuj ĝuste perceptataj. Ni povas tamen ilin konsideri kiel tutaĵon, kiel komplekson da kaŭzoj determinintaj la evoluadon de la literaturo. Kaj tiu ĉi komplekso da kaŭzoj estas formita de la kondiĉoj, en kiuj la literaturo devis ekkreski. Tiujn ĉi ni devas ekzameni tiel koncerne la naciajn, kiel ankaŭ koncerne la Esperantan literaturon; kunmetante poste la rezultaton de nia konsiderado, ni tuj povos rimarki la gravajn diferencojn kaj determini ankaŭ la supre nomitajn kriteriojn.

Ni devas nun turni nian atenton al kelkaj demandoj rilatantaj la esencon de la nacilingvaj literaturoj analizonte: unue, la ĝeneralan signifon de la esprimo „literaturo"; due, la kaŭzojn formantajn la bazon por ĝia konstruiĝo; trie, la ordinarajn stadiojn de ĝia evoluado.

La vorto „literaturo", kiu jam en ĉiu kultura lingvo enradikiĝis, devenas el la latina „litteratura". La Romanoj tradukis per tiu esprimo la grekan „grammatike", kaj komprenis origine sub ĝi la konon de la „litterae" aŭ „grámmata". Litterae estis la nomo kolektiva por la tuta alfabeta signaro, kaj tial la vorto litteratura signifis komence la konon de la literoj ĉe legado kaj skribado. Sed nuntempe ni donas al ĝi pli altan sencon prenante kiel temon de nia konsiderado la tutan skribaĵaron de iu popolo. La hodiaŭa lingva kutimo necesigas preter tio du diversajn limigojn de la ideo „literaturo." Sub la vorto literaturo en senco ĝenerala ni komprenas la tutan skriban produktaron de ia popolo, inkluzive ĉiuj sciencaj verkoj, kaj ĉiuj periodaj revuoj kaj gazetoj. Se ni tamen uzas la vorton „literaturo“ sen pluaj klarigantaj atributoj, ni nure opinias la literaturon en senco partikulara, nomita ankaŭ beletristiko, kiu okupiĝas nur per la verkoj kreitaj de popolo sur la kampo de l' arto skribata kaj plej bone reflektantaj la morojn, la karakteron, la pensadon kaj la moralan animforton de l' nacio.

---

[1] La sekvojn de tiu ĉi fakto mi jam klarigis en mia artikolo „Pri Esperanta verkado" aperinta en la januara numero de tiu ĉi gazeto (1920).

Ambaŭ difinoj estas ankaŭ aplikeblaj al la Esperanta literaturo: dezirante tamen kunmeti ĝian kompletan historion ni ne povas nin limigi al la sola t. n. beletristiko, sed ni devas ankaŭ same konsideri ĉiujn verkojn aperintajn sur la kampo de la sciencoj kaj ĉiujn pli gravajn gazetojn havantajn konstantan influon sur la evoluo de nia literaturo kaj stilo.[1]

Doni plenan respondon al la demando pri la bazo, sur kiu konstruiĝas literaturo, estas ankaŭ neeble, almenaŭ en la limoj postulataj de la celo de tiu ĉi artikolo, ĉar ni devus sendube ripeti tiel ofte la esploradon, kiom da popoloj ekzistas en la mondo kultura: aliflanke la utilo alportata de tia aparta laboro por ĉiu literaturo estus preskaŭ nenia, ĉar mi devus sekvigi serion da konkludoj, kiuj certe ne havus unu kun la alia tro grandan interrilaton. Sed tiom detalan analizon ni ankaŭ tute ne bezonas: ĉar nia ĉefa klopodo estas ja fari komparon inter nacilingvaj literaturoj unuparte kaj Esperanta literaturo aliparte. La akcesoraj cirkonstancoj, kiuj havas aŭ povas havi influon sur la konstruado de iu literaturo nin ankaŭ tute ne interesas en ĉi tiu kazo; ni devas kontraŭe penadi reprezenti al ni unuecan tipon de la naciaj literaturoj, en kiu, forlasante ĉiun flankan efikon, nur tiuj kaŭzoj (bazoj por la konstruiĝo de la literaturo) montriĝas, kiujn ni ĉe ĉiu popolo renkontas. Ni do devos kunmeti el la historio de ĉiu literaturo sole la komunajn elementojn, kaj kontraŭe neatenti ĉion ceteran, kiu kaŭze de sia individueco estas tute netaŭga por nia celo. Kompreneble ankaŭ en ĉi tiu rilato mi povos citi nur kelke da faktoj.

Ĉiu nacia literaturo formas tutaĵon por si mem, apartan ĉe ĉiu popolo. La bazo, sur kiu konstruiĝas nacia literaturo, kaj la kaŭzoj, kiuj ĝin faras tiel malsama de la aliaj, devas esti serĉataj ĉe la popolo mem.

Unue ni konsideru la lingvon. Itala filozofo skribis foje: „La morto de la lingvoj estas tiu de la nacioj“. Per aliaj vortoj, oni ne povas preni el la organismo de popolo la lingvon, sen ruinigo de la tuta organismo: tute same kiel se ni volus elŝiri la animon el la korpo. Ni povas konsideri la lingvon kiel „animon parolantan“ de l' popolo, ĉar ĝi estas la ĉefa ilo je nia dispono por komuniki nian psikan travivadon al la kunhomoj. En lingvo vivanta vibradas la spirito de l' nacio. La lingvo estas ankaŭ aliparte la ilo kondiĉanta la ekziston de la literaturo mem: sen lingvo ne povas naskiĝi literaturo. Dependigante nun la tri konceptojn: popolspirito, lingvo, literaturo unu de la alia, rezultas de si mem la konkludo, ke literaturo estas nenio alia ol la reprezento de la nacia spirito perata de la lingvo.

En dua loko ni havas la religion. Ĝi havis ĉiam gravan influon sur la evoluado de la literaturo. Mi ne parolas tie ĉi pri determinita konfesio, sed kontraŭe pri religio en ĝenerala senco. Ni eĉ ne bezonas meditadi la demandon pri la dia deveno de l' religio, sed ni ĝin konsideru nur de homa vidpunkto. Religio estas filozofio. Religio estas metodo de vivo — kaj mondrigardado, bazita sur la psikologio de la homaro. Estas ankaŭ por ni seninterese, kia religio en la kuro de l' jarcentoj ĉe tiu aŭ alia popolo evoluiĝis. Fakto estas, ke ĉia, eĉ ne kulturema, nacio posedas ian religion, aŭ almenaŭ ties rudimentojn. Ĝi eble havas sur la tuta evoluado de popolo pli da influo ol oni volus kredi unuavide, ĉar ĝi estas gravega elemento de la morala kaj socia vivado de l' nacioj. Kaj tion ĉi ni trovas ĉiuloke esprimata en la literaturo!

Ni havas ankoraŭ pluajn kaŭzojn, kiuj radikiĝas en la popolvivado mem. La ekonomia kaj nacia komuneco de evoluo de multaj personoj kaŭzas en ili sendube tre similan idearon. Sed popolo estas nenio alia ol granda amasiĝo da personoj! Al tio oni devas ankoraŭ aldoni la komunecon de la politika vivado. Ĝi eĉ okazigis ĉe ĉiu popolo tute apartan specon de literaturo: la militan lirikon. La idealo de la nacia unuiĝo ludis ciam en tiu ĉi kazo la plej gravan kaj signifan rolon.

La diritaj faktoj altrudas al popolo ideojn, kiujn ofte oni trovas nur ĉe li, kiuj ekscitas (kiomfoje!) la envion kaj ĵaluzon de l' najbaro. Kaj tiun ĉi senkonscian popolvivadon, kiu tute trapenetras kiel fluido l' animojn de la nacianoj kaj ilin per samvibra pulsado interligas, ni trovas fidele esprimatan en la literaturo.

Kian konkludon ni povas nun fari? Ni vidas, ke nacia literaturo dependas ekskluzive de l' spirito de la koncerna popolo. Se ni pli supre difinis la lingvon kiel „animon parolantan“ de l' popolo, ni povas nun sammaniere konsideri la literaturon kiel „animon skribatan“ de l' nacio. La tutan sentan vivon de iu popolo, liajn ĝojojn kaj suferojn, lian evoluon kaj historion, lian humiliĝon, esperon kaj supreniĝon, ĉion ni trovas en lia literaturo. — Tial estas ĉia nacilingva literaturo komplete regata de la spirito de la relativa popolo. Ni povas ankaŭ nune facile klarigi al ni, kial la tradukado de klasikuloj estas tiom malfacila, kial estas neeble redoni en tradukaĵo la „veran spiriton de la lingvo“.

Unue ni okupiĝu pri la tria demando, pri la evoluo de la literaturo ĝenerale.

Ne estas tie ĉi nia tasko pristudi la evoluon en ĉiu aparta kazo, ĉar la tiurilatajn klarigojn donas al ni ĉiu literatura historio. Ne: ni devas kontraŭe klopodi eltiri laŭeble el la historio de la literaturoj la normojn de ilia disvolviĝo. Sed bedaŭre tiu ĉi tasko ankoraŭ hodiaŭ atendas sian definitivan solvon. Mi citas sekvonte kelkajn pensojn de l' Germana literaturhistoriisto A. Bartels, kiuj speciale adaptiĝas al nia kazo: „La difino de la leĝoj pri la evoluo de la literaturo malsukcesis ĝis nun tiel same kiel similaj provoj pri la normoj regulantaj la vivon aŭ la historian evoluadon . . . Preciza laŭleĝa evoluado de ĉiu literaturo ne povas esti nerifuteble fiksata. Tamen, kiel en ĉiuj kampoj de l' vivo, tiel ankaŭ en la literaturo ĉiam ree prezentiĝas parencaj fenomenoj, kaj ilin konsiderante, akurate komparante kaj fine sistemigante, ni povas ja pasi al la starigo de difinitaj leĝoj de evoluado, kiuj, kvankam ne tute determinantaj la movadon kaj ne atingantaj la perfektan „ekzaktecon“, tamen aperas al ni kiel grandaj karakteriziloj de literatura evoluado kaj lokigas tiun ĉi lastan ekster la limoj de la hazardo. Per aliaj vortoj, kompara literaturscienco estas ebla.“[1]

Ĉiu nacilingva literaturo posedas propran evoluadon, kiu ĝin diferencigas de la aliaj. Sed estus tre malagrabla laboro, se dezirante esplori la leĝojn de la literatura evoluado ni volus krei prototipon de la literaturo; eĉ supozante la eblecon de simila kreitaĵo, ĝi identiĝus nur kun la idealo de literaturhistorio, ĝi povus esti maksimume skema bildo, kiu efektive neniam ekzistis kaj ankaŭ neniam realiĝos. Tiamaniere la praktika valoro de niaj deduktoj estus tre malgranda; pro tio ni devas ankaŭ resti senkondiĉe sur la kampo de l' realeco, se ni volas pristudi la samspecajn fenomenojn, kiujn ni renkontas en diversaj kazoj.

(Daŭrigota.) *F. Glaser.*

---

[1] Multaj Esperantistoj, precipe komencantoj, havas la bedaŭrindan kutimon konsideri kiel grava kaj zorgeme konservi ĉian paperon, nur ke ĝi estu esperantlingve presita. Oni nur observu, ke ne ĉiu esperantaĵo estas ankaŭ literaturaĵo! — Specialan atenton meritas ankaŭ tiuloke la gazetoj. Foje multajn ni havis: sed ne ĉiuj — malĝojiga konfeso! — estis tute indaj je nia afero, kaj pro tio kaŭzis kompreneble malutilon al nia internacia movado, naskante grandan dispartigon de l' komuna laborado kaj malhelpante tiamaniere (mi volas esperi senintence!) floran prosperadon de niaj altŝatataj ĉefrevuoj. En verko pritraktanta la historion de l' Esperanta literaturo oni devus pro tio nur mencii la revuojn, pri kies literatura produktado ni povas esti ankaŭ fieraj.

[1] A. Bartels: Einführung in die Weltliteratur, Volumo III. (Ĉapitro: Die Gesetze der Literaturentwicklung. Pĝ. 706).

☛ **Kongresanoj! Petu sufiĉe frue vian pasporton por iri al la XIIa kongreso. Ne prokrastu!**

Hector Hodler †

El Esperantaj gazetoj

„*Esperanta Finnlando*“: „Mi apenaŭ trograndigos, dirante, ke ĉefe dank' al li Esperanto dufoje estis savata el plej krizaj cirkonstancoj. En 1907/08, post apero de Ido, li ĝuste ekvidis la rimedon por restarigi la unuecon. Li rimarkis, ke la Esp. movado sin okupas preskaŭ sole per propagando interne de ĉiu nacio, kaj ke la Esperantistoj, havante internacian lingvon, tamen ne utiligas ĝin praktike; la sekvoj estis rapida malvarmiĝo de adeptoj, malkontento, personaj intrigoj, „plibonigemo“. Tiam li fondis UEA. . . .

„Sed la milito estis ankoraŭ pli grava danĝero . . . Al H. Hodler ni ŝuldas tion, ke UEA restinte la sola internacia organizaĵo de Esp-istoj, malgraŭ ĉio daŭrigis ekzisti . . . Nenia do miro, ke dum la milito kaj post ĝia fino oni ekvidis en „Esperanto“ nian ĉefan organon kaj en Ĝenevo nian centron. Esperantujo kaj Esperantio fariĝis identaj. Se la Esp. mondo nun reviviĝis, se eĉ la lastaj dormuloj nun vekiĝas, ni ŝuldas tion en grandega mezuro al li, kiu nin nun forlasis.“

En „*Esperanto-Praktiko*“ S-ro Hans Jakob skribas: „Rajte oni povas diri, ke H. Hodler dediĉis sian vivon plene al Esperanto. Malgraŭ lia granda talento por la arto, li nur malofte okupis sin pri ĝi, uzante sian tempon nur por nia movado. Matene li regule venis en la oficejon, faris la necesajn disponojn, laborante kiel oficisto; ofte eĉ dum dimanĉo li estis en la oficejo, pripensante novajn aferojn aŭ priparolante kun siaj kunlaborantoj farotajn laborojn. Tiu, kiu interrilatis kun li baldaŭ devis ŝati lin.“

„*Nova Tempo*“ (april/majo) skribas: „Vere nur tia genia gvidanto, kia Hodler estis, kaj kiu mem per senlaca devoplenumo estis modelo por ĉiuj liaj kunlaborantoj, estis kapabla enkorpigi en tian efektive internacian, kaj sur la tuta tero dispartigitan soldataron, la necesan disciplinon, sen kiu la tuta institucio de delegitaro estus senvalora.“

En „*Germana Esperantisto*“ (majo/junio) J. Karsch skribas: „Mortis H. Hodler — idealisto sed ne utopiisto! Celante plej altajn ŝtupojn de homa evoluo, li komencis racie konstrui de malsupre. UEA kaj ĝiaj membroj, praktike helpantaj unu al alia, estis por li unua ŝtupo, demonstranta kiel devus esti ĉiu en homaraj rilatoj realaj kaj moralaj. Ni vivantaj danku al li daŭrigante la vojon . . . Lia spirito estu vivanta inter ni!“

La entombigo

La lasta adiaŭo al H. Hodler okazis en Ĝenevo la 19 majo. Alvenis el Bern S-roj Stettler, Jakob kaj Richez, el Lausanne F-ino Ruche, F-ino Richardet kaj D-ro de Lerber, el Lyon (Francio) S-ino Farges kaj S-ro Poncet. Centra Oficejo de UEA, Ĝeneva grupo „La Stelo“, Esperantistaro en Lausanne kaj Morges, Presejo de „Esperanto“ sendis belajn florkronojn kaj bukedojn kun verdaj rubandoj.

Je la 3a posttagmeze la veturiloj kun la familio kaj Esp. delegitoj alvenis al tombejo St-Georges, kie atendis sesdeko da Ĝenevaj samideanoj ĉirkaŭ la ĉerko. En la kapelo la konata protestanta predikisto Ferrier diris konsolan vorton al vidvino kaj ĉeestantoj. Poste D-ro Privat, S-ro Stettler kaj S-ro Poncet adiaŭdiris H. Hodler je nomo de liaj personaj amikoj, de UEA, de S. E. S. kaj de eksterlandaj Esperantistoj. Profunda estis ĉies emocio kaj malsekaj multaj okuloj.

„Kara Amiko Hector Hodler,“ ekkriis S-ro Stettler je nomo de UEA, „bonvolu akcepti nian dankon pro la plej grava ofero farebla de homo al homoj: Pro via vivo, kiun vi donis al ni. Malŝatante ĉion, kio kutime allogas la homojn, ne atentante la avertojn de via surlaborita korpo, vi nur vivis por la sankta ideo de l' Esperantismo. Ĝi plenigis vian koron, kiu ĝin rebrilis kiel sunradio varmiganta. Al ni ĉiuj en UEA vi estis la patro, juna laŭ aĝo, matura pro via vivsperto kaj suferado. Sentante kun mirinda klareco la ireblan vojon, ankoraŭ malluma al ni, vi kondukis nin, necedema koncerne la principoj, sed adaptema al la cirkonstancoj. Al la personoj, kiun vi honorigis je via intimeco, malfermiĝis amikeco sen vortoj, je fideleco pruvita. Ne povante disiĝi je vi, ni starigos en nia memoro la monumenton plej daŭran, kiun kapablas starigi la homoj. Ripozu en paco, vi amiko plej kara, batalinto kaj suferinto. La altaj pensoj, kiujn vi pensis, vivos, kaj tiel vi vivos inter ni kaj iam poste inter la tuta homaro.“

Poste, la ĉerko estis entombigata apud tiu de l' pentristo Ferdinand Hodler. Ambaŭ geniaj viroj nun dormas kune. Super la tombo de l' patro staras, inter marmora kadro, mirinda pentraĵo lia, harmonia kaj serena. Super tiu de la filo ankaŭ stariĝu verko lia kiel monumento: Ni solene ĵuru daŭrigi pli vigle la konstruadon de l' tutmonda interfrata domo: UEA.

* * *

Je nomo de S-ino Hodler kaj je nia, ni tutkore dankas pro la multnombraj kortuŝantaj esprimoj de simpatio ricevitaj okaze de nia granda ĉagreno.

KRONIKO

Ni petas ĉiun propagandiston, ke li mem senpere kaj rapide informu nin pri sia agado. Oni sendu klarajn, koncizajn raportojn kun rimarko „Kroniko“ al nia Centra Oficejo, Museumsstrasse 14, Bern.

Mallongigoj uzataj: *Esp.* = Esperanto; *Esp-isto* = Esperantisto; *L. I.* = lingvo internacia; *prez.* = prezidanto; *vicprez.* = vicprezidanto; *sekr.* = sekretario; *kas.* = kasisto; *rev.* = revizoro; *bibl.* = bibliotekisto; *l.* = lernanto; *m.* = membro; *p.* = persono.

Aŭstrio.

Wien: Esp. vivo ĝojige prosperas. Esp Diservo, dum kiu Pastro F. Meŝtan klarigis la gravan signifon de Esp. Lia kardinala Moŝto la ĉefepiskopo D-ro F. G. Piffl favore akceptis la protekton pri „Espero Katolika“, esprimante sin favore por Esp. Soc. „Danubio“ aranĝis bone vizititan rememorkunvenon okaze de la tria datreveno de la morto de D-ro Zamenhof. Parolis S-roj Kaftan, Maschl, Schicketanz. Kursoj en la realgimnazio kaj burĝa lernejo, kie ankaŭ 8 instruistoj lernas. — ***Voitsberg:*** S-ro Halbedl faris paroladon, sekvita de kurso kun 57 p., instruas S-ro Rogler.

Belgio.

Gent: Klubo „La Progreso“ aranĝis artan Esp. feston je la honoro de la prez. S-ro L. Cogen. Tondris kantoj, deklamoj kaj muzikaĵoj, kaj la rememorindan vesperfeston finis belega unuakta komedio „La Fajrero“, de Pailleron, lerte tradukita de la festoheroo.

Britio.

Bradford: Okazis kvaronjara konferenco de Yorkshira Federacio, 80 p. Sekvis kunsido de konsilantaro de B. E. A kaj publika vesperkunveno, 150 p.; prezidis la urbestro, parolis S-roj Warden, Merchant kaj kvar knaboj el unuagrada lernejo. Propagandaj kunvenoj ĉe Greenfield preĝejo kaj parolado ĉe la komerca klubo. — ***Burnley:*** La societo aranĝis interesan multvizititan ekspozicion de alilandaj korespondaĵoj, pri kiu loka ĵurnalo favore raportis. — ***Edinburgh:*** La 19—20 junio okazos la 15a Skota Kongreso. La okazo estas epokfaranta pro la asociiĝo kun la Universitato. La urbestraro konsentis doni sian patronecon, kaj la urbestro prezidos ĉe la propaganda kunveno. — ***Folkestone:*** S-ro Smith Clough parolis pri „La Lingvo por la Nacioj“. — ***Glasgow:*** Okazis ĉiujara kunveno de la societo. „Vagada Klubo“ denove funkcias dum la somero. La someraj vespermanĝoj jam komenciĝis. — ***Leith***: 2 kursoj en la Teknika Kolegio. — ***London***: Dum 1 maja socialista manifestado karbministo S-ro Mark Starr faris paroladon pri Esp. Eksportgazeto „The Outfitter“ enhavas artikolojn en Esp. — ***Portsmouth***: Paroladoj kaj kurso. — ***Sheffield***: S-ro Merchant paroladis ĉe la kooperativa societo. Kurso. — ***Tisbury***: S-ro L. A. Long gvidas kurson. — ***York***: Diservo de pastro G. C. Beach. Pastro A. J. Ashley faris interesan predikon, traktante la idealan flankon de Esp. — ***Wallsend***: Okazis vistludo kaj danco profitaj por Esp.

Ĉeĥoslovakio.

Brno: Parolado de S-ro Kroužil antaŭ 80 blinduloj. Kurson gvidas studento Kozák. S-ro V. Kroužil publikigis en socialista gazeto „Budarenost“ artikolon pri la enkonduko de Esp. en la Rusajn lernejojn. Tre vigla movado. Esp-istoj varbis 8 ĵurnalojn, kiuj regule raportas pri nia movado. Rekomendinda metodo de propagando. Estas preparata ekspozicio kaj petata alsendo de Esp-aĵoj (adreso: Leŭt. Mráz, Praha, Suńcha Jocubste placo 275/2). — ***Bystrice p. H., Brno*** kaj ***Prostejov***: S-ro Cimr el Madrid faris propagandan paroladon. — ***Cerny Kostelec***: Kun la permeso de la ministrejo de instruado, Esp. estas provizore enkondukita en burĝa (super-elementa) lernejo, 30 l. Instruas B. Ludvik — ***Chrástan Plzne***: Socialista organizaĵo komencis kurson, 25 p. — ***Holeshov***: La 11 majo parolado de S-ro Cimr, oficisto de la konsulejo en Madrid, pri Hispanio, kaj pri la utilo de la internacia lingvo. — ***Krashovice u. Kaznova***: Laborista gimnastika asocio malfermis kurson, 23 p., instruas S-ro F. Pašek. — ***Leitmeritz***: La Esp. angulo regule aperas en la „Leitmeritzer Zeitung“. — ***Mähr.-Schœnberg***: Nova kurso kun 17 p. Loka gazeto „Grenzbote“ aperigas artikolojn. — ***Olomouc***: Parolado de S ro Cimr el Madrid; ekskurso de la grupo de Usov. — ***Plzen***: Laborista asocio aranĝis du kursojn en popola lernejo, kaj vesperan kurson por laboristoj el la ĉirkaŭaĵo, 68 p. Ilin gvidas S-ro Pech. — ***Praha***: Esp. Klubo aranĝis kursojn en ĉambro de popola lernejo, dufoje semajne instruis: en elementa (90 p.) S-ro Hromada, en supera (10 p.) S-ro Lukáš. De 1 februaro nova supera kurso (20 p). 19 januaro parolado de S-ro Hromada pri UEA, kongresoj en Haag kaj Praha, komitato por la komuna komerca lingvo; 12 aprilo pri H. Hodler. La 31 januaro amuza vespero (100 p.). En la ĝenerala kunveno la 19 aprilo estis elektita S-ro A. Pitlik kiel sekretario. La Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista fondiĝis la 1 februaro. Adreso: Rud. Hromada, sekr., Praha-VII, Sochařská 333. La Germana-Esp. Unuiĝo malfermis kurson kun 20 p., kiun gvidas S-ro Bischitzky. Skoltaj Esp-istoj, instruistoj kaj ĉiuj interesemuloj pri la skoltesp. afero sin turnu al S-ro Pitlik (Nerudova 40, III p.). — ***Rumburg***: F-ino Anjo Prihoda faris paroladon, post kiu komencis kurso. — ***Tetschen***: „Tetschen-Bodenbacher Volks-Zeitung“ aperigas ĉiusemajne Esp. angulon en Germana lingvo. Estis aranĝita kursfinekzameno kun 25 p. kaj amuzvespero, en kiu oni honoris la prezidanton, S-ron Klinger. — ***Uzhorod-Ungvár***: Fondiĝis grupo kun 50 m. Kurso komenciĝis.

Estonio.

Tallinn (Reval): Okazis vesperfesto de Estonia Esp. Unuiĝo „Espero“. La enspezoj de la festeno estis surprize grandaj: 5000 Est. Markojn da profito al la societa kaso. Akcia societo „Esperanto“ estas nun oficiale registrita kaj komencas agadon. $^4/_5$ de la akcioj (entute 500,000 Est. M.) estas aĉetitaj. Baldaŭ estos eldonita Estona-Esp. vortaro.

Finnlando.

Helsingfors: En la Komerca altlernejo estas komencita kurso pro iniciato de la societo de l' studentoj. Instruas S-ro Ojala, 32 p. Okazas kurso kun 4 p. en la blindula instituto, gvidata de F-ino Anna Friman. — ***Kuusankoski***: Estas fondita societo. — ***Kymi***: S-ro K. Huuskonen komencis kurson kun 59 p. — ***Mikkeli***: Estas anoncita kurso, gvidata de S-ro A. Lippa. — ***Oriversi***: La dujara popola altlernejo enkondukis Esp. 50 p. studas, gvidataj de magistro Kärki. — ***Oulu***: La lecionoj en la laborista instituto bone progresas. El la 375 lernantoj pli ol 200 partoprenas la kurson. Esp. ankaŭ estonte ne povos esti forigata el la instruprogramo de l' instituto. — ***Pirkkala***: La lernantoj en la evangelia popolaltlernejo fondis societon Esp-istan. — ***Tampere***: Socialdemokrata studocirklo, kurso, 60 p., instruas F-ino Elsa Hellström. — ***Viipuri***: Fondiĝis koresponda instituto de Esp. Kongreso okazis.

Francio.

Annecy: La grupo restariĝis dank' al S-ro Laiguier. — ***Béziers***: Nia samideanino Roksano daŭrigas propagandi. — ***Bordeaux***: La grupo sendis al la packongreso leteron pri „Akcepto de Esp. por la Pactraktadoj kaj Packontrakto“. — ***Grenoble***: Laŭdinda movado sin montras en la geinstruistaro. Vigle propagandas S-ro Caillet. — ***Le Creusot***: S-roj Diard kaj Decouches revekas la grupon. — ***Melun***: „Le Chrétien libre“ enhavas artikolojn en Esp. — ***Montpellier***: „L'Information Méridionale“ skribas pri Esp. — ***Neuilly-sur-Seine***: „La Paix organisée“ skribas pri la morto de H. Hodler, en kiu la pacifismo kaj Esp. perdas plej bonan pioniron. Ankaŭ artikolon pri Esp. de S-ro Adam. — ***Nice***: „La Gazette Hôtelière“ enhavas artikolojn de S-ro C. Roncati, Del. de UEA. — ***Paris***: Parolado de Prof. Charles Richet, ano de la Scienca Akademio, ĉeestata de multaj eminentuloj, kie li aŭdigis gravajn kaj konvinkajn vortojn pri la „Utileco de L. I. pro la progresigo de la industrio, komerco kaj scienco“. Granda interesiĝo. „La Vie Ouvrière“ donas ofte artikolojn pri Esp. de S-ro Adam. „Esope“ kaj „L'Internationale Chrétienne“ publikigis artikolojn en Esp. „Mercure“, organo de la Universala Komerca Muzeo, enhavas artikolojn pri kaj en Esp. S-ro L. Méras skribas en loka foirgazeto pri „Esp. en la turismo“. — ***Toulouse***: Kursoj ĉe la „Junularo Socialista“.

Germanio.

Achim: S-ro Segelken faris paroladon, post kiu fondiĝis grupo. — ***Auerbach i. V.***: S-ro Hugo Gerisch regule aperigas mallongajn trafajn komunikojn en la tagaj gazetoj de l' Vogtland. — ***Augsburg***: Fondiĝis laborista Esp. grupo. — ***Bamberg***: La grupo regule kunvenas en kafejo Schönlein. — ***Bremerhaven***: En metia lernejo Esp. estas enkondukita kiel libervola instrufako; la instruanto estas honorariata de la urbo. Partoprenas 25 p. de 14 ĝis 61 jar aĝe. Lokaj gazetoj favore raportas. — ***Dresden***: Dank' al klopodoj de S-ro Ranf la intereso pri Esp. grandiĝas. En la popollernejo 150 infanoj partoprenas Esp. studadon. — ***Eisenach***: 26 p. sekvas la kurson en la popola supera lernejo, gvidata de D-ro Waldmann. La magistrato donacis 250 Mk. por Esp.-gvidlibro. — ***Essen***: La grupo festis sian dekjaran fondiĝdaton. Paroladis S-ro Pillath. — ***Frankfurt a. M.***: S-ro R. Kreuz eldonis flugfolion pri „Mondreklamo kaj Mondhelplingvo“, represaĵo de la loka foirgazeto. — ***Frankenberg i. Sa.***: S-ro A. Naumann instigas en „Frankenberger Seminarblätter“ lerni Esp. — ***Hamburg***: La instruista faka semajna gazeto „Pädagogische Reform“ en sia N-ro 17 enhavas lerte skribitan ĉefartikolon „La kleriga valoro de Esp.“ de S-ro F. Kraus. Okazis varboekspozicio. „Dia Regno“ intencas reaperi. Interesiĝantoj sin turnu al S-ro Paul Hübner, Reeseberg 56. — ***Hartenstein i. S.***: En la popola lernejo Esp. fariĝis laŭvola instrufako. — ***Kamenz***: Prof. Reichel parolis „Revolucio en la lingvo kaj Esp.“. Rezultis du novaj kursoj kun 27 kaj 18 p. — ***Kronach***: S-ro Karl Loy parolis. Formiĝis legrondo. — ***Merseburg***: En la Rusa mililtkaptitejo fondiĝis grupo „Rondeto de amatoroj“, kursoj estas gvidataj de S-ro Simeon Seliščev; ĉar mankas libroj oni petas alsendon de ne plu uzotaj libroj. — ***Mittweida***: S-ro V. Happoch komencis sian kurson kun 30 p. — ***Neukölln***: Internacia pedagogia ligo akceptis uzi nur Esp. „Soz. Erzieher“ estas favora al nia movado. — ***Niederhermsdorf***: Laŭ unuanima decido de la lerneja konsilantaro Esp. fariĝis deviga instrufako. La nova lernejleĝo atentigis speciale pri tio. S-ro Scheibler, al kiu oni ŝuldas tiun sukceson, komencis la instruadon. — ***Pfaffenhofen***:

Grupo fondiĝis. — ***Plauen i. V.:*** Esp. estas enkondukita en la urba metia lernejo. — ***Regensburg:*** Fondiĝis grupo. — ***Sebnitz:*** S-ro Krempler komencas novan kurson por junaj laboristoj. — ***Seifhennersdorf i. S.:*** Prof. D-ro Göhl komencis kurson kun 20 p. — ***Stendal:*** Movado inter la gimnazianoj. — ***Weinböhla:*** Reviviĝo de la grupo. — ***Werdau:*** S-ro Neumann enkondukis Esp. en popola altlernejo. Estas fondita asocio „Obstine antaŭen", kiu gvidas 4 kursojn, el kiuj 3 por infanoj, 71 p. En la komerckontoro de L. Ander Esp. estas praktikata. „Werdauer Tageblatt" eldonas „Esp. angulon".

Hispanio.

Barcelona: La unua kongreso de Iberiaj Esp-istoj estas promesplena; jam aliĝis altrangaj doktoroj, advokatoj, licenciatoj, industriistoj kaj komercistoj. Societo „Nova Sento" gvidas 3 kursojn, entute 77 p. Sukcesaj publikaj paroladoj organizitaj de „Paco kaj Amo", sekvotaj de nova kurso, 45 p. Stariĝis nova grupo „La Espero". — ***Huesca:*** La oficiala organo de la komerca ĉambro enhavas artikolon pri Esp. — ***Rubi:*** Renkontiĝo de samideanoj el Barcelona, Tarrasa kaj Sabadell. Parolado por Esp. kaj gastigo de malsatantaj infanoj el Aŭstrio. — ***San Felix Martir:*** „Action Social Obrera" skribas pri la morto de S-ro H. Hodler. — ***Sevilla:*** Vizito de Holandaj samideanoj Ges-roj Kyftembelt venantaj el Hindio kaj propagandantaj pri la XIIa. La Andaluzia Federacio okazigis sian IVan kongreson. — ***Villanueva de las Minas:*** S-ro Marmol gvidas kurson. — En ***Tarrasa, Zaragoza, Huesca, Vich*** la samideanoj forte laboras por gastigi infanojn el Aŭstrio kaj Hungario.

Hungario.

Budapest: Oni fondis „Esperantan Kameron" laŭ parlamenta sistemo por diskuti ĉiujn temojn pri la movado. Sukceso: Vigla Esperantlingva parolado de ĉeestantoj, interesiĝo de Esperantistoj, ankaŭ de komencantoj. Kunsido en ĉambrego de Socia Muzeo (VI., Eötvös u. 3) dufoje semajne vespere. Komerca revuo „Közép Duna" (Meza Danubo, VII., Damyanich u. 25 a. III) publikigis longan artikolon pri Esp. kaj adresaron en Esp. de ĉiuj oficejoj kaj branĉoj Budapestaj. Kursoj komenciĝas unu post alia.

Italio.

Bologna: S-ro Palmeggiani gvidas kurson. — ***Verona-Mantova:*** S-ro Adv. Vaona paroladis, invitita de la tiea Popolkultura Lernejo. Sekve oni komencis kurson, gvidata de la sama, kun pli ol 50 p. Okazis ankaŭ alia parolado en Verona, ĉe la Popola Universitato, sekvita de kurso. — ***Palermo:*** Grupo reorganizita. Nombra kurso.

Jugoslavio.

Belgrad: Oni fondis du novajn societojn, akademian kaj laboristan. — ***Zagreb:*** La societo aranĝis kurson por progresintoj kun 30 p., gvidata de S-ro Kastner kaj por komencantoj, gvidata de S-ino Bedeković. Estis aranĝita ankaŭ sukcesa ekspozicio. Laborista societo „La Espero" malfermis novan kurson, 40 p., gvidata de S-ro Tomič. S-ro pastro Jesich faris paroladon kaj fondis katolikan Esp. societon kun 50 m. — ***Vinkovci:*** Refondiĝis societo sub la gvido de D-ro Stanišic.

Polio.

Kalisz: Vigla propagando, precipe post alveno de Prof. Kronenberg. Estas eldonataj lernolibroj dank' al monhelpo de S-ro J. Lustig. Loka jurnalo „Gazeta Kaliska" raportas pri nia movado. — ***Kolo, Konin, Uniejow:*** Vigleco. — ***Turek:*** Dank' al S-ro B. Strelczyk okazis 2 kursoj. — ***Warszawa:*** La ilustrata revuo „Przeglad Swiatowy" enhavas artikolon kaj specialan Esp. fakon sub redaktado de S-ro Edw. Lonkopolanski. Okazis granda ekskurso de UEA-anoj kaj gastoj.

Nederlando.

Hago: La VIa Internacia Kongreso de la Katolikoj Esp-istaj okazos la 15—16 aŭgusto.

Portugalio.

Lisboa: Kurso kun 30 p. ĉe la Laborista Esp. Federacio, kiu petas pri Esp-aĵoj. Ĉe „Verda Stelo" daŭras 3 kursoj. Okazis paroladoj. Ĉe „Fratiga Stelo" kursojn gvidas S-ro A. Dias. Gazeto „O Socialista" daŭrigas regule sian Esp. fakon. — ***Porto:*** Fondiĝis societo „Idealo kaj Laboro", kiu malfermis multlernantan kurson.

Silezio.

Beuthen: Lokaj gazetoj „Weisse Adler", „Oberschlesische Grenzzeitung" kaj „Oberschlesische Zeitung" aperigis artikolojn pri Esp. kaj pri H. Hodler.

Svedio.

Malmö: La klubo festis sian 14-jaran ekziston. S-ro Jönsson paroladis Svede pri „Idealismo", post kio sekvis Esp. kantoj kaj promeno. — ***Sandviken:*** S-ro Adamson paroladis pri „Intern. lingvo al la laboristaro", sekvis kurso, gvidata de S-ro Görlund. — ***Stockholm:*** S-ro Tell gvidas kurson kun 12 p. — ***Trondhjem:*** Esp kroniko de S-ro Naalsund en „Dagsposten".

Svisio.

Genève: Artikoloj de D-ro Privat en „Voix du Travail" kaj „Droit du Peuple". La grupo „Stelo" sendis pere de F-ino A. Ŝarapova, kiu reiris Rusion belan verdan banton kun ore presitaj salutoj al la Rusaj samideanoj. — ***Chaux-de-Fonds:*** Laŭ propono de S-ino Wolf la lerneja komisiono favore konsideras la libervolan enkondukon de Esperanto por la lastaj klasoj: la enkonduko efektiviĝos post konsento de la lerneja konsilantaro. „La Sentinelle" kaj „La Lutte Syndicale" publikigis artikolojn pri la alpreno de Esp. en Rusio, de D-ro Privat.

Ameriko.

Ann Arbor (Usono): Kurso gvidata de S-ro Jaffe, 20 p. — ***Boston*** (Usono): Oni festis la 15an datrevenon de la starigo de la Amerika Esp. Asocio. Paroladis S-roj Lee kaj Payson. — ***Buenos-Aires*** (Argentino): Kurso per korespondado, 20 p., kaj parola de la grupo „Lumo", S-ro Barrot gvidas, kurson ĉe la grupo „Liberiga Stelo". Kursoj en la sidejo de la Hispana Framasonaro, kiu decidis sendi alvokon al ĉiulandaj framasonoj por ke ili uzu Esp. en siaj internaciaj interrilatoj. Ĉiuj framasonaj gazetoj publikigas en speciala paĝo priesp. artikolojn. — ***Erie*** (Pa., Usono): Prof. Bobrowski enkondukis Esp. en polan kolegion laŭordone de la rektoro. Fondiĝis studenta klubo. — ***Habana*** (Kubo): „La Discusion" enhavas Esp. fakon, redaktatan de S-ro H. Zayas Botell. — ***L. N. Alem*** (Argentino): S-ro M. Novelli Güell enkondukis Esp. en la lernejon, kies direktoro li estas. — ***Medanos*** (Argentino): Sukcesplenaj Esp. ekzamenoj ĉe la grupo „Internacia Progreso". — ***Mexico*** (Meksiko): „Flores de Loto" okupiĝas pri Esp. — ***Montevideo*** (Urugvajo): Kursoj funkciadis ĉe la grupa sidejo. Estis disdonataj multaj propagandiloj. Grava ilustrita revuo „Mundo Uraguayo" sin okupis pri Esp. Nova komitato reelektita sub la prezido de S-ro J. W. Bouzas. — ***New York*** (Usono): La ŝtata komerca Ĉambro, konvinkita pri la graveco de Esp. kiel komerca lingvo, nomis ĝin inter la lingvoj por siaj ekzamenoj. Oni starigis daŭran Esp. klub-ĉambron. Okazis parolado de S-ro Morton. La klubo „Harmonio" transformiĝis en Esp. Instituto. La barĉoj ĉiam pli kaj pli kreskadas kaj kun ili nia movado kaj lingvo, kiu nun estas alprenita en la komerca ĉambro kiel samvalora al aliaj kvar internaciaj komercaj lingvoj. La nacia Esp. kongreso okazos la 22—25 julio, dato agrabliganta la travojaĝontajn Esp-istojn al Hago. Ĉiuj estas kore bonvenataj (adreso: Esp. Instituto Harmonio, 1 West 34th Street).

XIIa UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hago, 8—15 aŭgusto 1920

Sesa komuniko

Kotizoj. — Ni ripetas, ke la kotizo estas 10 guldenoj sendotaj al la Residentiebank en Hago. Oni sendu per poŝtmandatoj aŭ per ĉekoj. Sendante ĉekon, oni elskribigu ĝin en Nederlanda valuto kaj igu ĝin pagebla je iu granda banko en Nederlando, ĉar la Residentiebank ne havas tiom da internaciaj korespondantoj.

La loka kongreskomitato decidis, ke el sama familio nur la familiestr(in)o bezonas pagi la plenan kotizon (fl. 10), dum ke la ceteraj familianoj *rajtas* pagi la duonan kotizon (fl. 5). Supozeble ne ĉiuj samfamilianoj aplikos tiun rajton!

Premio. — Ĉar la Nederlanda Porfremdula Societo donacis al la loka kongreskomitato kvanton de la ilustrita Esperanto-traduko de „Holland-Express“, ni decidis ĝin donaci al la unuaj 250 enskribitaj kongresanoj ekster Nederlando. Nia propaganda komisiono siatempe prizorgos la ekspedon.

Garantia fundo. — Ni bedaŭre konstatas, ke ĝis nun nur sumo de 475 guldenoj estas enskribita kaj tio ĉio de Nederlanda deveno. Denove ni ripetas la celon de tiu fundo: se post la kongreso pruviĝus, ke la elspezoj superus la enspezojn, la garantianoj estos devigataj pagi laŭproporcie en la deficito. La garantioj konsistas el *enskriboj* po 25 guldenoj: monon ni tute ne demandos antaŭ ol estos necesa.

Donacoj. — Kun multa danko ni ricevis la jenajn donacojn: S-ro J. M. Rosenörn en Jaca (Hisp.), fl. 1.44; Esp. Soc. „Paco kaj Amo“ en Barcelono (Hisp.), fl. 2.82; S-ro H. van Duuren en Wamel (Ned.), fl. 0.60; S-ro W. H. G. van Tinteren en Amsterdam (Ned.), fl. 10; N-ro 8686 en Edinburgh (Skotl.), fl. 14.50; S-ro D-ro Edmond Privat en Genève (Svis.), fl. 3.15. Entute estas ricevita sumo de fl. 543.16, el kio fl. 35.56 de eksterlando.

Valuta problemo. — Ĉiuj interkonsentos, ke niaj unuaj postmilitaj universalaj kongresoj plej bone povos okazi en nemilitintaj (neŭtralaj) landoj. Sed el tio rezultas malagrablaĵo en la formo de grava valuta problemo. La monkurzo al Nederlando kaj aliaj neŭtralaj landoj estas plej malfavora por precipe la mez — kaj nov — Eŭropaj landoj. Emociajn petegojn ni ricevis de diversaj flankoj por iel solvi la problemon, por ke almenaŭ kelkaj delegitoj de nomitaj landoj povus viziti la XII-an. Kompreneble, la loka kongreskomitato ne scias trovi solvon de mondproblemo, pri kiuj la plej konataj financistoj kaj aŭtoritatoj rompas al si la kapon. La tiel senpacience atendata oficiala valuto-konferenco eĉ ne ankoraŭ stariĝis. Dume, en nia enlanda movado ne troviĝas Mecenatoj, kiuj per malavaraj donacoj grave povus helpi al alilandanoj.

Tamen la problemo plenigis niajn korojn kaj kapojn depost la komenco de nia kongrespreparado. Estas du manieroj por helpi niajn petegantajn samideanojn el la pro monkurzo suferantaj landoj. La unua maniero proponita de subskribinto estas klopodi formi per mondonacoj de plibonstataj samideanoj valutan fundon, el kiuj, interkonsente kun la donacintoj kaj la koncernataj naciaj Esp. societoj, estus ebligata grandparte (ekzemple $^{3}/_{4}$) pagi la kostojn de almenaŭ unu delegito. Laŭ la ricevotaj monsumoj, ni laŭvice elektus la unu nacion post la alia, tiel ke fine ĉiu nacio el Eŭropo estus delegata.

Dua maniero estas oficiale proponata de la Germana Esperanto-Asocio. Oni ne petas subvenciojn aŭ donacojn, sed pruntojn je tia termo, ke la monkurzoj havos pli da normaleco inter si ol nuntempe. G. E. A. eĉ volas certigi deziratajn garantiojn por la restituo de la pruntoj.

Nederlanda proverbo diras, ke oni povas fari unu aferon ne lasante la alian. Ni do alportas la 2 proponojn al la Esperantistaro de la neŭtralaj landoj kaj al tiuj landoj (kiaj Britujo kaj Nord-Ameriko), kiuj ne troviĝas en monkrizo. Al mi, kasisto, ne estos troa laboro okupi min pri la necesaj aranĝoj, per kiuj ankaŭ la sukceso de nia kongreso estos plifirmigata. Ju pli landoj estus reprezentataj despli gravan signifon havos nia kongreso. Ankaŭ por tiuj monsendoj funkcios la Residentiebank: oni ne forgesu klarigi la monsendojn por eviti konfuzojn.

Aliĝoj. — En nia 4a komuniko ni publikigis 63 kongresanojn, dum en tiu ĉi komuniko 50 novaj estas troveblaj. Laŭlande kaj laŭloke grupigitaj, ili estas:

Belgujo (2): *Bruxelles*, F-ino M. A. Jennen (66). — **Britujo** (15): *Coventry*, F-ino Clarice O. Taylor (72); *Keighley* (Yorksh.), C. M. Houghton (78); *London* (N 22), R. Robertson (97); *Mold* (N. Wales), F. Llewellyn-Jones (107); *Stonehouse* (Devon), E. J. Lethbridge (80), S-ino Lois Lethbridge (81). — **Francujo** (12): *Paris*, J Camescasse (68). — **Hispanujo** (9): *Tarrasa*, V Alavedra (100), J. Bassó (102), N. Casamada (105), S. Chaler (106), J. Figueras (101), J. Flotats (104), F. Salvatella (103), M. Solà (99). — **Nederlando** (43): *Aalsmeer*, D. W. G. Keessen (71); *Arnhem*, D-ro C. J. Baart de la Faille (79); *Culemborg*, O. de Beus (74); *Enschedé*, G. P. de Bruin (76); *'s-Gravenhage* (Hago), H. Alkemade (65), F-ino A. Evers (95), S-ino C. J. Roskes-Dirksen (96); *Haarlem*, A. Rutgers (69), S-ino J. Schenk-de Visser (70); *Nijmegen*, J. P. L. Niesten (73); *Oost-Souburg*, P. Zeegelaar (77); *Utrecht*, W. Baaten (85), G. H. W. Coté (75). — **Nord-Afriko** (1): *Alger*, S-ino E. Figuières (64). — **Nord-Ameriko** (1): *West Newton* (Mass.), Esperanto-Oficejo (nomo mankas) (98). — **Polujo** (4): *Inowraclaw*, J. Orzech (67). — **Skotlando** (15): *Cowdenbeath*, D-ro J. Boyd Primmer (3), S-ino D-ro J. B. Primmer (108), F-ino Anne K. R. Primmer (109), F-ino Jane H. Primmer (113), F-ino Jessie Primmer (110), S-ino Robertson (112); *Edinburgh*, J. B. Anderson (86), F-ino J. Baird (87), W. Harvey (88), F-ino Annie M. Munro (91), W. M. Page (92), J. Sutherland (93), J. M. Warden (94); *Leith*, F-ino Maggie S. C. Mc. Nab (89), F-ino Elisa Brown Milne (90). — **Svedujo** (1): *Malmö*, Erik Andersson (84). — **Svisujo** (4): *Genève*, D-ro Edmond Privat (82), S-ino D-ro E. Privat (83).

La ciferoj post la landnomoj signifas la tuton de enskriboj, dum ke la cifero post la propraj nomoj signifas la kongresnumeron. Antaŭe ni jam publikigis: Danujo (2); Germanujo (2) kaj Italujo (2). Entute 14 landoj kun 113 enskriboj.

La kongressekretario:
J. L. Bruijn.

Internacia Instituto de Esperanto

(Dumkongresaj ekzamenoj)

La Internacia Instituto de Esperanto organizos dum la kongreso en Hago ekzamenan kunsidon por la *Profesora Diplomo* kaj por *Atesto pri kapableco*. Kandidatoj dezirantaj enskribiĝi kaj ricevi la regularon skribu (kun respondkupono) al la prezidanto de l'juĝantaro D-ro Privat, 2, Ch. de Roches, Genève (Svisio).

Laŭ la programo, la lingvaj postuloj estas jenaj:

Atesto pri kapableco

Tiu ekzameno havas skriban parton kaj parolan parton. Estas postulate, ke la kandidato bone konu la gramatikon, vortaron kaj sintakson, povu flue kaj korekte paroli la lingvon kaj sciu pri la historio kaj ĝenerala organizo de Esperantismo.

Profesora Diplomo

Tiu ekzameno havas skriban parton kaj parolan parton. Estas postulate, ke la kandidato plene konu la gramatikon, sintakson kaj vortaron de la lingvo, plene konu nian literaturon (Verkaron de D-ro Zamenhof, k. t. p.) pruvu sian studadon de la historio kaj organizaĵoj de Esperantismo (Kongresoj, Akademio, Universala Esperanto-Asocio, Interna Ideo, Paroladoj de D-ro Zamenhof, k. t. p.), konu la diversajn metodojn de esperanta instruado (parola metodo, senpera metodo, instruo por la infanoj, k. t. p.). Li devas nepre flue kaj perfekte paroli, por ke li povu en Esperanto taŭge komentarii ian donitan tekston, bone klarigi stilan aŭ gramatikan demandon.

* * *

☛ **Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj. Pruvu, ke estas almenaŭ kvin mil. UEA bezonas 5000 membrojn!**

* * *

DIVERSAĴOJ

Esperanto kaj militkaptito

Mi volas rakonti epizodon de mia amiko Taubmann, estinta eldonisto de „La Marto“ (aperinta en Bohemio. *Red.*), kiun mi aŭdis de instruisto, kiu estis kun li kvar jarojn en militkaptiteco. Kiam mi venis al tiu sinjoro, li diris al mi: „Taubmann kaj lia Esperanto estis nia feliĉo. Ni estis kaptitaj en Karpatoj 1915 kaj transportitaj sub grandaj suferoj kaj malfavoroj al Čita (Siberio). T. malgraŭe ne perdis bonhumoron. Alveninte en Ĉita ni venis en barakon cirkaŭitan per 4 m alta plankmuro. Ni vidis nur la plankojn kaj la ĉielon. T. prenis tuj sunbanon. La gardisto venis al li kaj ordonis, ke li vestu sin, dirante, ke ĉi tie valoras nur Rusa kaj ne Eŭropa kulturo. T. ne tuj obeis, kaj pro tio li venis en malliberejon por tri tagoj. Reveninte el la malliberejo, pasis nian barakon Rusa kompanio kun muziko por esti transportata al militejo. T. grimpis sur la pordegon por elrigardi. Li incitetis la gardiston: malliberejo. Ree reveninte li skribas longan leteron. Ni čiuj miris, ke li skribas leteron, ĉar oni diris al ni, ke ne estas ankoraŭ permesite, skribi hejmen. Poste li interrilatis kun gardisto por porti la leteron en la urbon. La posteno rifuzis la peradon, sed post kelkaj tagoj T. tamen sukcesis štelsendi la leteron al la urbo. T. per hazardo estis trovinta adreson de samideano el Ĉita.

Je eksterordinara tempo malfermiĝis foje la pordego, eniris du sinjoroj, demandante pri la Esperantisto. Ni tuj alvokis T. Ĉiuj 60 samsortanoj, kiuj estis kun li en la barako sekvis, por vidi kaj aŭdi, ĉu T. eble jam ree faris sensencaĵon. Sed tiufoje estis alia afero. Li iris al ambaŭ sinjoroj, salutis ilin: „Bonan tagon, samideanoj!“ kaj babilis kun ili kiel en la gepatra lingvo. Ni ĉeestantoj estis kortušitaj vidinte, ke ambaŭ „malamik-amikoj“ prenis al nia kunulo la manon kaj parolis kun li, kiel oni parolas kun homo (ĝis nun ni čiam nur estis kvazaŭ objektoj).

T. petis la samideanojn, kiuj portis la kvinpintan verdan stelon, ke ili faciligu al li kaj liaj kunuloj la sorton, ke ili ricevu la permeson iri en la urbon por aĉeti manĝaĵojn, ĉar la ricevitaj ne estis sufiĉaj kaj ofte tute nemanĝeblaj. Per helpo de la Esperantistoj li ricevis la permeson, kaj nun ni fartis pli bone. Ni havis sufiĉe da manĝaĵoj. T. montris sin kiel lerta komercisto (profesie li estas instruisto.) Li aĉetis aĵojn, poste li vendis ilin kun profito al Rusoj kaj aĉetis aliajn por ni. Tiamaniere ankaŭ tiuj, kiuj ne ricevis monon el la hejmlando povas esti regalitaj same kiel tiuj, kiuj ricevis monon. Post kelkaj monatoj ni havis provizojn en la valoro de 12,000 da rubloj. Taubmann estis grandkomercisto! Ni fartis bone. Al ni mankis nur la libereco kaj la hejmo.

T. čiam korespondis kun Japanaj samideanoj; tiun permeson li ankaŭ ricevis dank' al la Esperantistoj, kaj tiamaniere ni aŭdis, kio okazas en la mondo. En la urbo li gvidis por Rusoj kurson por progresintoj, kaj por militkaptitoj li tuj devis komenci tri kursojn, ĉar ĉiuj deziris lerni Esperanton, aŭdinte pri la sukceso de T.

Li fariĝis vera apostolo inter la militkaptitoj, kaj la varbitaj anoj estas konvinkitaj pri la taŭgeco kaj uzebleco de nia lingvo, ĉar ili mem sentis kaj ĝisvivis la Esperantismon. Per helpo de la Rusaj samideanoj T. fariĝis profesoro por la Germana lingvo ĉe la gimnazio por knaboj en Čita. La tutan liberan tempon li uzas por la propagando inter la Siberianoj. La instruisto diris: Tiuj samideanoj, kiuj fariĝis Esperantistoj en Čita certe estos favoraj pioniroj por nia movado, reveninte hejmen. Esperu ni, ke ĉiuj baldaŭ venos sane en la hejmon. Vivu Esperanto! *Gustav Scholze.*

☛ Kongresanoj! Petu sufiĉe frue vian pasporton por iri al la XIIa kongreso. Ne prokrastu!

Esperanto kaj Ligo de Nacioj

La estraro de UEA invitis la ĝeneralan sekretarion de la Ligo de Nacioj sendi riprezentanton al Hago por ĉeesti niajn kunvenojn kaj informiĝi pri la funkciado de l' Asocio. Sir Eric Drummond mem respondis dankante pri la invito kaj anoncante sian intencon delegi iun kun objektive dokumenta tasko.

La vic-sekretario ĝenerala de la Ligo, S-ro Nitobé, venis Ĝenevon por la Ruĝ-Kruca Kongreso kaj profitis la okazon por informiĝi pri la ĉefaj internaciaj movadoj kies centroj estas tie. Interalie li vizitis D-ron Privat por sĉiiĝi pri UEA kaj la progresoj de Esp.

* * *

La „Germana Asocio por la Ligo de Nacioj“ nun havas specialan Esperanto-Komitaton, konsistantan el Prof. Christaller, Prof. Dietterle, A. Junker, Prof. Schmidt kaj Bankdirektoro Vogt. La sekretario estas Vice-poštdirektoro O. Rieck (Wolgasterstr 38 b, Greifswald), kiu proponas, ke oni fondu similajn komitatojn ĉe la diverslandaj naciaj asocioj por la Ligo kaj sciigu lin pri la nomaroj.

Efike tio estus tre necesa por instigi la diversštatajn delegitojn subteni la proponon por oficiala alpreno de Esp. Jam en Francio kaj Britio niaj samideanoj eklaboras por tio.

La voĉo de la dankado

La jenajn kortušajn liniojn ni eltiras el letero de Ĉeĥoslovaka samideano mendinta ateston de la G. K. Imitinda ekzemplo de fervorulo, kiu esprimas sian dankadon al Esperanto ne nur per vortoj, sed ankaŭ per trafaj agoj.

Longatempe mi devis ŝpari, antaŭ ol estis al mi eble sendi al vi la necesan sumon por unu garantia atesto. Malriča mi estas — sed tamen mi tion faris, por montri al vi, ke mi estas konvinkita pri la utileco de la Asocio, kaj por montri, ke en nia juna respubliko ne mankas intereso por nia movado tutmonda. Per la aĉeto de la atesto mi ankaŭ pagas almenaŭ parteton de mia granda ŝuldo al Esperanto, ĉar nur al ĝi mi devas esti dankema por mia nuna kontenteco. Dum tri jaroj mi militservis, kaj kiel soldato mi estis en la nuntempaj Aŭstrio, Polio, Hungario, Rumanio, Jugoslavio kaj Italio — kaj preskaŭ ĉie, kien la sorto min forblovis, mi trovis samideanojn, kiuj min ĉiam akceptis kiel sian propran fraton, agrabligis al mi la vivon kaj montris al mi ofte tiom da afableco, ke mi per tio eĉ estis embarasita. Mi ekkonis, ke la vortoj de nia kara Majstro pri „unu granda rondo familia“ efektiviĝas — kaj post tiom da spertoj mi ĵuris, ke mi restos fidela al Esperanto kaj preterlasos nenian okazon, fervore ĝin propagandi. Kiel mi do diris: Mi pagas nur mian ŝuldon. *M. L.*

TRA LA GAZETARO

Ambasadoro Esperantista

∴ *„Esperanta-Finnlando“* (aprilo) adiaŭas nian eminentan samideanon Profesoron G. J. Ramstedt, prezidinto de la Finnlanda Esp. Asocio, kiu estis sendita al Japanio kiel ambasadoro de sia Respubliko.

Naskiĝinte en 1873 li estas konata sciencisto pri orientaj lingvoj kaj etnografio. Ne nur liaj samideanoj, sed la tuta klerularo de lia lando lin honoras ankaŭ kiel kuraĝa kaj modesta viro, granda idealisto kaj nobla aganto.

Niaj finnaj amikoj sciiĝis, ke la esperantistoj en Peking pretiĝis por lin inde akcepti, sed ili ricevis neniun novaĵon pri li de post lia enŝipiĝo en Marseille.

Legado de *„La Revuo Orienta“* (marto) ebligas nin trankviligi ilin. Japana Delegito de UEA, S-o Takahaŝi, tie rakontas entuziasme pri lia alveno kaj gastiĝo. Prof. Ramstedt jam trovis multajn amikojn en Tokio.

Esperanto ĉe katolikoj

∴ „*Espero Katolika*“ (aprilo) anoncas, ke L. M. kardinalo Piffl, ĉefepiskopo de Vieno, akceptis altan protektadon de tiu ĉi revuo kaj subskribis Esp. aŭtografan aprobon: „Esperanto certe estas taŭga helpi la defendon de la katolika kredo.“

La Esp. movado inter katolikoj rapide revigliĝas, ne nur en Vieno, kie la revuo trovis jam kvindekon da abonantoj, sed en ceteraj landoj kiel Francio, Nederlando, Ĉeĥoslovakio. En artikolo „Novaj Perspektivoj“ M. Mielert difinas inter urĝaj taskoj:

„1e rekonduki la homojn, unue la katolikojn, el nacia ŝovinismo al sento de veraj homaranismo kaj frateco, al kristana solidareco“. Ankaŭ la katolikaj Esp-istoj deziras eldoni en nia lingvo plej gravajn por ili verkojn.

Sesa Katolika Esp. Kongreso okazos en Hago la 15 kaj 16 aŭgusto. Sin turnu al organiza sekretario: S-ro P. J. Zentgraaff, de Riemerstr., Hago.

Spertoj en Siberio

∴ En „*British Esperantist*“ (majo) Majoro Rosher rakontas, ke li multfoje uzis Esp. en Siberio, kie li vojaĝis dum la milito. En Ĥarbin kaj Vladivostok li estis ĝoje akceptita de tieaj samideanoj. Apud Ĥabarovsk li trovis 200-membran Esp. Klubon ĉe tendaro de militkaptitoj. Unu sola, S-ro Egelmann, estis en la komenco. Li pruntedonis sian lernolibron al alia, kiu siavice kopiis ĝin kaj transdonis al alia, k. t. p. Ili faris ĝardenon stelforman kun Esp. kiosko kaj eldonis manskriban gazeton. Granda frateco regis inter ĉiuj.

Novaj gazetoj

∴ „*Laboro*“ (majo) formato 16×22 cm., ok paĝoj Monata organo de „Portugala Laborista Esperanto-Federacio“. Adreso: T. da Agua de Flor, 33, Lisboa.

Tiu talente redaktita gazeto konigas al ni fervoran Esp. movadon inter portugalaj laboristaj rondoj, kie malfermiĝis multaj kursoj. Ĝi celas ankaŭ: „diskonigi tra la tuta mondo la penson de la laboristoj, ilian vivon kaj mizeron; certigi niajn eksterlandajn kamaradojn pri nia neŝanĝebla fido en la estonteco . . .“

∴ „*Esperanto Triumfonta*“ (aprilo) formato 30×46 cm., eldonata de Teo Jung, Horrem, Köln (Germanio). Profesia presisto eldonas mem tiun ĵurnalon kaj deziras ĝin aperigi ĉiusemajne. La lingvo estas ĉiel bona kaj la enhavo tre diversa kun multaj ilustraĵoj. Notitaj artikoloj: La vekiĝo. La lando de la Dekdua. Kiel profiti la valuton por Esperanto? Esperanto en Polujo. Komerco kaj Ekonomio. Literaturaĵoj. Scienco kaj Tekniko. Aviado. Sporto. Filatelio, k. t. p.

Artikolo pri propagando analizas ideojn de D-ro Vogt, Bankdirektoro en Augsburg: „Nia preskaŭ ĉie ekzistanta ĝisnuna kutimo, ke kelkaj entuziasmaj Esperantistoj laboras en siaj liberaj horoj por nia afero, devas esti ŝanĝota, se ni volas atingi pozitivan rezultaton. Ni dungu taŭgajn kaj kapablajn virojn kun granda organiza talento, kaj ni pagu ilin laŭmerite. En Svisujo tia unuaklasa propagandisto kostas hodiaŭ inter 15—20,000 Frankoj, en Francujo same, en Anglujo proksimume 1000 funtoj sterlingaj kaj en Ameriko eble 8—10,000 dolaraj. La sama forto estas dungebla en Germanujo po 15—20,000 Mk.“

Aliaj gazetoj ricevitaj:

∴ „*Hungara Esperantisto*“ (aprilo), „*La Verda Ombro*“ el Formoso, Japanio (februaro), „*Nederlanda Katoliko*“ (aprilo), „*Germana Esperantisto*“ (majo/junio), *Internacia Komerca Revuo*“ (marto/aprilo), „*Esperanto Mitteilungen*“ (15 aprilo), „*Svisa Espero*“ (aprilo), „*Esperantista Laboristo*“ (apr. kaj majo), „*Esperanto-Praktiko*“ (aprilo), „*Nia folieto*“, el Belgio (febr./marto), „*Nederland-Esperanto*“ (1, 15, 22 kaj 29 aprilo), „*Germana Laborista-Esperantisto*“ (majo), „*Nova Tempo*“ (febr./marto), „*La Espero*“ el Stockholm (marto kaj aprilo), „*Hispana Esperantisto*“ (marto), „*La Unuigita Tuthomaro*“ (majo), „*Amerika Esperantisto*“ (marto). „*Przeglad Swiatowy*“ el Varsovio, kun Esp. rubriko.

TRA LA LIBRARO

Rimvortaro Esperanta, de *Avoto*. Enhavanta 5412 rimojn, aranĝitajn en 508 klasoj. Eldonis: Brita Esperantista Asocio, London, 1918. 11×14 cm, 34 p. Prezo: tole bindita, 1 sh. 6 d.

Unuavide la ordo en tiu libreto ŝajnas stranga: alfabeto laŭ la fino de la vortoj anstataŭ laŭ la komenco, sed post kelka uzado oni ŝatas tiun por la rimistoj tre taŭgan, logike ellaboritan helpilon. Kompare kun la ĝisnuna vortaro de rimoj, kolektita de S-ro Rhodes, aperinta en 1905, la nova verketo estas progreso. Pli klara, pli sistema kaj pli riĉa. La antaŭa enhavis proksimume 4950 rimojn, la nuna 5400. Notinda estas ankaŭ la restadejo de la pseŭdonima S-ro Avoto, kiu verkis la libreton en la „Brita Militzono, Francujo kaj Flandrujo, aprilo-junio 1917“. En la antaŭparolo li prudente avertas la uzontojn, ke sola rimado ne faras poezion. „Mi provizas la vortojn, oportune aranĝitajn; estas *via* parto provizi la genion.“ — Fine ni atentigas, ke tiu riĉa vorttrezoro ankaŭ utilas al ne-geniuloj. Ĉar la vortoj, ne konsiderante la rimon, sin sekvas en plej bela malordo, oni povas uzi la libreton por ripeti (kaj lerni) nian lingvon. Se okaze kondukanto de grupo legos unu vorton post la alia, demandante la signifon, li ekscitos multan ĝojon . . . kaj silenton. Provu ĝin! — *St.*

Kleine Esperanto-Sprachlehre, de instruisto *Hermann Böbs*. Eldonis: Ader & Borel, Dresden, 1918. 11×15 cm, 64 p. Prezo: ne montrita.

Bona gramatiko, sufiĉe kompleta en malgranda volumo, praktike aranĝita kun bonaj ekzemploj. En la estontaj eldonoj, kiujn ĝi meritas, estu evitataj kelkaj lingvaj kaj logikaj malbelaĵoj, kiel ekz. „La botisto flikas tiajn ŝuojn, kiuj estis difektataj“; „preferi ovaĵon ol viando“ (intence ol anstataŭ al. Kial?); „en nia lingvo estas amaso da lerninda“ (lernindaĵoj). „Rapidvagonaro ne haltas en ĉiu stacio kaj bezonas tial proksimume nur la duonan tempon pro sia preskaŭ duobla rapideco“ (du kaŭzoj nekorekte kunigataj per *tial* kaj *pro*). „La tramvojo, kies elektraj veturiloj estas nur duope aŭ triope, dum fervoja vagonaro enhavas ofte 30 vagonojn („Elektra“ estas nur la motora veturilo, ne la senmotoraj vagonoj). — *St.*

The Esperanto Home-Student, de *James Robbie*. Eldonis: Skota Federo de la Esp. Societoj. 7a eldono. 17×10 cm. 56 p. Prezo: 6 d.

Tiu ĉi oportuna libreto estas speciale difinita por hejma studado de Esperanto. Ĝi tute plenumas sian celon. En dudek-ses lecionoj estas prezentata la tuta gramatiko de nia lingvo kun la plej ofte uzataj vortoj, ekzercoj de traduko kaj rimarkoj pri gramatiko kaj stilo. Pro sia malkareco la lernolibro de nia samideano J. Robbie meritas grandan disvastiĝon; oni cetere jam presis de ĝi 35,000 ekz. en 7 eldonoj. — *A. R.*

Propono pri Skolta Esperantista Ligo, de *A. V. Thomson*. Eldonis: la aŭtoro, 40 Oaklands Rd., Bexleyheath, Kent (Anglio). 13,5×9 cm. 16 p. Prezo: 4 d.

En tiu ĉi broŝureto, la aŭtoro proponas la starigon de Skolta Esperantista Ligo kaj faras kelkajn sugestojn pri ĝia organizo kaj laboro. Sur p. 10 troviĝas propono pri skolta terminaro kun Angla traduko kaj en la fino de la broŝuro aliĝa promesilo. La Skolta Ligo fondiĝos tuj kiam 200 promesiloj estos subskribitaj. La vojo montrita de S-ro A. V. Thomson ŝajnas al ni prudenta kaj saĝa. Ĉiuj interesuloj mendu lian broŝuron, el kiu rezultos esperebie la starigo de forta skolta-esperantista movado. — *A. R.*

La Tagiĝo. Kanto Esperantista de *Antoni Grabowski*. Muziko de *Baránski*. Eldonis: *J. L. Bruijn*, Hago (Nederlando). Prezo: fl. 0. 20.

Tria preso de la bela originala poeziaĵo de nia samideano Grabowski kun muziko. Mendu ĝin ĉiuj kantemuloj kaj muzikamantoj!

Lingvaj Studoj

Pri neologismoj

Inter la deziresprimoj akceptitaj de Esperantista konferenco okazinta en Parizo kaj aperintaj en la gazetoj, ni legas jenan: „... la redaktantoj de gazetoj kaj oficialaj eldonaĵoj, ne enkonduku la uzon de *io* anstataŭ *ujo*, sen oficiala decido de la L. K.“.

Tiu ĉi vidpunkto ŝajnas al ni ne konforma al la ĝisnunaj kutimoj. La L. K. ne havas la taskon mem dekreti novajn sufiksojn aŭ novajn vortojn, sed nur oficialigi ilin post kiam ili estas praktike eksperimentitaj en libroj kaj gazetoj. Tiu eksperimenta metodo estas scienca. Ĉu nova formo estas bona aŭ malbona, povas plej trafe montri ne la teoria diskutado, sed la praktika uzado. Tial, estas necese, ke novaĵoj povu esti provataj en tekstoj antaŭ ol esti oficialigataj. Sen tiu necesa provperiodo, la L. K. riskus enkonduki en la lingvon formojn, kiuj, kvankam ili ŝajnas bonaj teorie, montriĝas ne taŭgaj en la praktika uzado.

Tiel agis la L. K. ĝis nun. La sufikson *-aĉ*, ekzemple, oni oficialigis post kiam ĝi de longe estis uzata en gazetoj. Se le supre aludita deziresprimo estus tiam aplikita, neniu gazeto estas povinta uzi *-aĉ* antaŭ la decido de la L. K. kaj tiu ĉi lasta certe ne estus ĝin enkondukinta, se neniu estus kuraĝinta ĝis antaŭe uzi en tekstoj. Tiamaniere nia lingvo tute ne plu povus evolui.

En kelkaj gazetoj oni nun prove uzas *mis-* (anstataŭ *malbon-*) kaj *-enda* (anstataŭ *-ota*), kiu ricevas pli specialan sencon. Se la uzo de tiuj formoj disvastiĝas, tiam la L. K. ilin oficialigos, sed komprenèble por ke eksperimentado estu ebla, oni ne devas tuj trakti ĉiun ajn novaĵon kiel atencon kontraŭ la Fundamento. D-ro Zamenhof ja klare diris, ke la ekzisto de la Fundamento ne malhelpas plibonigi kaj perfektigi la lingvon. Oni tion pruvu! Pri „io“, ni ripetas, ke ĝi ne anstataŭas *-ujo*, sed nur limigas ĝian sencon (kiel *-enda* rilate al *-ota*).

Tio, kion ni supre diris pri afiksoj, ankaŭ aplikiĝas al vortoj. Multaj personoj de longe uzas *akuzi, heziti, konkeri, kontesti, rezisti*, anstataŭ *kulpigi, ŝanceliĝi, almiliti, disputi, kontraŭstari*, kiuj ne estas ŝanĝitaj, sed nur ricevas pli limigitan signifon. Tiuj vortoj ne estas ankoraŭ „oficialaj“, sed tio tute ne signifas, ke oni ne rajtas ilin uzi antaŭ decido de la L. K. Kontraŭe, la L. K. ilin oficialigos nur kiam ili estos sufiĉe vaste uzitaj.

Tiu eksperimenta metodo estas liberala kaj natura. Oni eble asertos, ke ĝi prezentas danĝeron, ĉar ĉiu skribanto povas provi novaĵon, tiel ke fine rezultos ĥaoso. La ĝisnuna historio montras, ke tiu timo ne havas fundamenton. Al la novemo de la verkistoj nature kontraŭstaras la malnovemo de la publiko. Aŭtoro, kiu plenigus sian verkon per tro multaj neologismoj, rapide ne plu havus legantojn, krom plenmano da lingvemuloj. Tiu ne povos sukcesi, kiu ne havas ĝustan mezursenton. Aliparte la kriterio de ĉiu novaĵo devas esti, ne persona kaprico, sed la praktika sperto.

Cetere, por eviti, ke tro multe da novaĵoj estu samtempe provataj, se iam evidentiĝus tia danĝero, la L. K. (reorganizota!) povus de tempo al tempo montri formojn rekomendatajn por prova uzado, kaj doni pri tio konsilojn al la gazetoj. Por la lernantoj sufiĉas, ke la lernolibroj aŭ la instruanto, doninte klarigon pri la evoluo de la lingvo, menciu la plej gravajn vortojn kaj la afiksojn, kiuj, kvankam ne ankoraŭ oficialigitaj, estas tamen renkonteblaj en gazetoj aŭ libroj.

Kun la tempo, tiuj novaj vortoj kaj formoj fariĝos pli kaj pli malofta̧j, ju pli kompleta estos la lingvo. Kiam ideo estas esprimata per taŭga vorto, praktike elprovita, neniu plu povas ŝanĝi tiun vorton, ĉar tia klopodo ŝajnas kaj estas sensenca. Oni do ne devas kredi, ke pliboniĝado praktike ne havas finon. Ĝi kontraŭe finiĝas, tuj kiam taŭga esprimo estas trovita. La demando pri la landnomoj estas ĝuste unu el la malmultaj ĝis nun ne ankoraŭ kontentige solvitaj kaj tial ofte diskutataj. Ni opinias, ke la enkonduko de la internacia finaĵo „io“ povas praktike ĝin solvi. Kiam tute internaciaj kaj koncizaj formoj kiel Bulgario, Germanio, Italio, Rumanio, k. a. estos uzitaj dum kelka tempo, certe neniu saĝa proponos post kelkaj jaroj anstataŭi „io“ per alia sufikso, ĉar pli internacia kaj pli konciza finaĵo ne ekzistas. Oni do ne plu reparolos pri tiu demando.

Fine, ni rimarkigu, ke se lingvaj studoj en la limoj de la Fundamento estas ne nur utilaj, sed eĉ necesaj por la praktika disvolvo de la lingvo, diskutoj pri *ŝanĝoj* en la strukturo de Esperanto ne plu estas allaseblaj. Tiuj diskutoj estis eblaj en la unuaj vivjaroj de Esperanto, antaŭ ol la lingvo estis sufiĉe elprovita, sed nun ni, el multegaj diversspecaj verkoj kaj el la buŝa uzado scias, ke la Fundamento de Esperanto estas praktike taŭga. Kiu estas Esperantisto, tiu devas akcepti ĝin kiel firman bazon ekster diskuto. Provoj similaj al tiuj de S-ro de Saussure, kiu arbitre decidas, ke ĝisnuna *n* akuzativa fariĝu signo de plurnombro, anstataŭas radikojn per aliaj laŭ sia bontrovo, ŝanĝas la alfabeton, ktp. estas prave malaprobataj de ĉiu serioza Esperantisto. Tio ne plu estas neologismoj, sed ŝanĝoj. Ili prezentas danĝeron por la ideo de lingvo internacia. Ŝanĝi la lingvon estas facila, sed malutila laboro. Kompletigi ĝin en la detaloj estas malfacila, sed utila tasko. S-ro de Saussure ĉiam preferis la unuan kaj sin montris nekapabla por la dua, kredante, ke la ĉielo lin destinis por esti la eltrovonto de la perfektega internacia lingvo. Tiu iluzio kostas al li kare... Sed la justa malaprobo, kiun renkontas liaj mallertaj proponoj, kripligantaj la tutan lingvon, ne signifas, ke ĉia ajn novaĵo estas malbona. Estas abismo inter la agado de lingvorompantoj kaj la penado por laŭgrade kaj praktike plibonigi la ekzistantan lingvon.

H. Hodler †.

Vortaro

Vipero aŭ vipuro?

En la pli multaj vortaroj (ekz. Grosjean-Maupin, Millidge, Kabe) kaj antaŭ ĉio en la Universala Vortaro, parto de la Fundamento, troviĝas *vipuro*. Tamen en la Plena Vortaro Esperanto-Esperanta de Prof. Boirac oni trovas *vipero* kun jena rimarko: „*Vipuro* en Universala Vortaro estas preseraro.“

En la decembra kajero de *Esperanto Praktiko* S-ro Max Butin atentigas pri al li adresita letero de D-ro Zamenhof, en kiu nia Majstro konfirmas, ke *vipuro* estas preseraro. Dusenceco pro *vipero* kaj *vip-ero* ne estas pli timinda ol inter *kulero* kaj *kul-ero*. Cetere, en ĉiuj lingvoj la radiko estas *viper'*. Estas do esperèble, ke en venonta eldono de la vortaroj, kiuj ĝis nun havas *vipuro*, oni enskribos *vipero*, montrante *vipuro* kiel arkaismon.

Ĉu *faruno* anstataŭ *farino* ankaŭ ne estus preseraro? En ĉiuj lingvoj la radiko estas ja *farin'* kaj la finaĵo *-in* ne estas ĉie elpelebla, kiel pruvas ekz. *doktrino, vazelino* kaj aliaj internaciaj radikoj finiĝantaj je *in*.

Varo

Al negocistoj utila estus aparta mallonga vorto por A. *ware*, F. *marchandise*, G. *Ware*, H. I. *mercanzia, merce*. *Komercaĵo* aŭ *negocaĵo* estas iom tro longaj por ofta uzo, precipe ĉe kunmetaĵoj, kaj ni vidas, ke la lingvoj de la du plej komercaj popoloj, la Angla kaj la Germana, havas mallongan esprimon. Proponinda estas la radiko *var-o*, komuna al tiuj du lingvoj, kiu estus aparte oportuna ĉe kunmetaĵoj. Ekz.: *varejo, varejestro* (komercaĵejestro!), *varvagono, vartrajno* (komercaĵvagonaro!), *varstacio, varprezo, vartrafiko*, k. t. p.

Ŝutro

Esperantaj vortaroj tradukas per *fenestrokovrilo* la esprimojn A. *shutter*, F. *volet*, G. *Laden*. Ĉu tiu vorto ne estas tro longa por tia ofte uzata esprimo? Ne estas bone, ke nia lingvo uzu sessilaban vorton kie al la naciaj lingvoj malpli longa vorto sufiĉas. Por la supre montrita senco, la plej konata radiko kaj la plej mallonga estas la Angla, kiu Esperante fariĝus *ŝutr-o*. *Fermu la ŝutron!* estas en la ĉiutaga vivo, kiu postulas koncizecon, pli oportuna ol la peza: *fermu la fenestrokovrilon*. Ĝi estas ankaŭ pli preciza.

W. L.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco de nacieco, raso aŭ lingvo. Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon de fremdaj popoloj. Disvastigi la uzadon de la lingvo Esperanto. Krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj kaj entreprenoj, kies interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio. — UEA kunigas ĉiujn samideanojn, kiuj per la forto de sia nombro kaj la utiligo de la Zamenhofa lingvo volas pruvi al la mondo, ke Esperanto vivas, taŭgas kaj progresas.*

Servoj: *Ĉiu membro rajtas peti informojn de la Delegitoj, uzi la servojn de la Asocio, senpage ricevi la Oficialan Jarlibron (aperos en junio 1920).*

Kotizaĵoj: **Membro:** *5 Fr. Svisaj. (Belgio kaj Francio: 6 Fr. Britio: 4 sh. Germanio: 12 Mk. Hispanio: 5 Pes. Italio: 7 L. Nederlando: 2.50 Guld. Skandinavio: 3.50 Kr. Finnlando: 10 F. M. Aŭstrio kaj Hungario: 30 Kr. Ĉeĥoslovakio: 12 Kr. Jugoslavio: 20 Kr. Bulgario: 15 Lev. Polio: 12 Mk. Usono: 1 Doll.)*

Membro-Abonanto *(ricevas la gazeton): 12.50 Fr. Svisaj. (Belgio kaj Francio: 15 Fr. Britio: 10 sh. Germanio: 30 Mk. Hispanio: 12.50 Pes. Italio: 17.50 L. Nederlando: 6.25 Guld. Skandinavio: 8.75 Kr. Finnlando: 25 F. M. Aŭstrio kaj Hungario: 75 Kr. Ĉeĥoslovakio: 30 Kr. Jugoslavio: 50 Kr. Bulgario: 37.50 Lev. Polio: 30 Mk. Usono: 2.50 Doll.)*

Membro-Subtenanto *(ricevas la gazeton): 25 Fr. Svisaj. (Naciaj prezoj: duoble pli ol membro-abonanto.)*

Membro dumviva *(kun la gazeto): 300 Fr. Svisaj.*

Esperantia Entrepreno *(komercaj firmoj, societoj, k. t. p.): 12.50 Fr. Svisaj. (Naciaj prezoj: same kiel membro-abonanto.) La Entreprenoj rajtas presigi 40-vortan anoncon en la Jarlibro.*

Centra Oficejo: *Museumsstrasse 14, Bern (Svisio). — Bankkonto: Handelsbank (Banque Commerciale), Bern. — Poŝtĉeko: III 2600.*

Direktado de UEA. — Post la morto de nia kara Prezidanto, la Direktoro de UEA priparolis la sekvojn de tiu grava perdo en du konferencoj kun la Svisa komitatano D-ro Edm. Privat. Ĉi-tiu bonvolis provizore, kaj ni esperas daŭre, akcepti la redaktadon de la gazeto „Esperanto“, kiu nun fariĝas posedaĵo de nia Asocio. Al la komitato ni sendis detalan raporton pri la gravaj organizaj ŝanĝoj, kiujn necesigas la nova situacio. Plie ni rajtas malkaŝi, ke la kara mortinto testamente donacis parton de sia havaĵo al nia Asocio. Pliaj detaloj estas publikigataj post la ordigo de la heredaj aferoj.

Jarlibro 1920. — Bedaŭrinde la eldonado de la Jarlibro ankaŭ prokrastiĝis tiun jaron, pro la simila kaŭzo kiel dum la lasta. Tiam ni presigis ĝin en Bern, kaj la presisto estis haltigata pro striko kaj ne venigebleco de necesaj pliaj literoj. Pro la alteco de la prezo kaj la profundegeco de la deficito 1919 ni decidis jam dum februaro, mendi la novan Jarlibron eksterlande. Sed malgraŭ ĉiuj promesoj la nova presisto baraktas kontraŭ malfacilaĵoj teknikaj, kiuj tre malrapidigas la kompostadon. Niaj membroj, kiuj ja el propraj spertoj scias kiom multe la nunaj cirkonstancoj diferencas de la antaŭmilitaj, bonvolu konsideri, ke ankaŭ ni ne povas tuj forigi malhelpojn, superantaj nian povon. Ni tre energie klopodas, por ke la lastaj presprovaĵoj alvenu komence de junio.

Atentigo. — Malgraŭ ofte ripetita peto ni ĉiam ankoraŭ ricevas sendaĵojn sub adresoj de nia mortinta prezidanto, de la Direktoro de la C. O. aŭ de personoj laborantaj en la Oficejo. Niaj korespondantoj bonvolu nepre adresi ĉion al la Oficejo sub la nomo de UEA; tio evitas al ni komplikaĵojn kaj perdon de tempo.

Esp. Grupoj. — Ni ree atentigas niajn Delegitojn, ke ni ne povas akcepti Esp. grupon kiel Membro-abonanton; UEA kalkulas ekskluzive *individuajn* membrojn; la grupoj ĝis nun anoncitaj kiel MA estas registritaj nur kiel Abonantoj.

Formuloj. — Ni informas, ke nova provizo de aliĝiloj estas preta. Delegitoj, kiuj bezonas tiun formulon, bonvolu skribi al ni.

Pago en nacia mono. — Ni ree atentigas, ke niaj membroj bonvolu pagi laŭ la prezoj fiksitaj por ilia lando. Ni ne povas akcepti pagojn per nacia mono, pli malalta ol tiu de la paginto, ekzemple Hispano per Francaj frankoj, Italo per Ĉeĥaj kronoj. Tia procedo ruinigus niajn financojn kaj igus senvalorajn ĉiujn tabelojn; diversaj personoj en neŭtralaj landoj demandis nin, ĉu ni akceptas ilian kotizon en Aŭstriaj kronoj!!! Eventualajn pagojn similajn al niaj reprezentantoj ni ne akceptas.

Kelkaj membroj en Francio plendas, ke ni kalkulas al ili tro alte; anstataŭ 12.50 Fr. Sv. ni pagigas 15 Fr. por membro abonanto. Tio estas grava eraro. La kotizo por membroj en Francio estas kalkulata en *Francaj frankoj*: sendante poŝtmandaton oni informu la poŝtiston, ke oni volas sendi koncernan sumon en Francaj frankoj; la oficisto mem plenigas la rubrikon pri la mono pagota en Sviso laŭ la tabeloj, daŭre ŝanĝantaj. Cetere nia kaso preferas ricevi bankbiletojn kiujn ni povas deponi ĉe nia banko atendante la plibonigon de la kurzo. Tiu lasta rimarko, valoras ankaŭ por niaj membroj en Germanio.

Por Estonio, S-ro L. Altmann, Poŝta kesto 103, Reval (Tallinn), akceptas pagojn por kotizoj laŭ jena bazo: M. 15 EM.; M. A. kaj E. E. 37.50 EM.; Subt.: 75 EM.; Koresp. Anonco, 1 enskribo 2.25 EM.

Enkasigo de Abonoj. — Ni informas niajn abonantojn, ke laŭ nia avertilo sendita dum aprilo ni enkasigos la nerepagintajn abonojn al „Esperanto“ per la poŝto; por eviti malkomprenojn ni atentigas, ke ni agos jene:

Senpera enkasigo de Bern: Danio, Svedio, Norvegio, Nederlando.

Enkasigo en Francio: Per S-ro L. Poncet, Delegito de UEA, Lyon.

Enkasigo en Germanio: Per S-ro Robert Kreuz, Frankfurt am Main. La enkasigon en aliaj landoj ni faros laŭeble per niaj perantoj. Ni petas niajn abonantojn, ke ili favore akceptu la poŝtrepagon ebligante daŭrigon de l' abono. Personoj, kiuj ne plu deziras aboni estas petataj resendi la numerojn ricevitajn dum 1920.

Garantia Kapitalo. — Ni rememorigas, ke ĉiu atesto de la nova serio kostas 300 Fr. Svisa valoro. Oni povas ĝin pagi ĉu en unu sola fojo, ĉu en tri jaraj pagoj da 100 Fr. Ĉiu mendinto de unu atesto de la G. K. estas dumviva membro kaj abonanto de „Esperanto“, kiaj ajn estos la venontaj prezaltigoj. La mendojn kaj pagojn oni bonvolu sendi al la C. O. de UEA.

La personoj, kiuj jam posedas ateston de la unua serio, povas akiri novan, pagante 100 Fr. Svisa valoro. Tiel agante, ili efike helpos al UEA.

Kotizaĵoj por 1920. — Je la 30 aprilo estis enkasigitaj 2507 kotizaĵoj (el kiuj 771 membroj, 1679 membroj-abonantoj kaj 57 subtenantoj). Krom tio estas 220 dumvivaj membroj. Sume: 2727. — *Esperantiaj Entreprenoj*: 66.

Statistiko de la korespondaĵoj. — Movado de la korespondaĵoj dum la monato aprilo:

Ricevitaj: 571. — Forsenditaj: 1775. — Tuta sumo: 2346. (Antaŭa monato: 1685.)

Subtenantaj membroj.

Sesa listo:

55. A. Egg, Baden (Svisio). — 56. D-ro V. Robin, Warzsawa. — 57. S. Tomiĉ, Zagreb (Jugoslavio).

Delegitoj. — Delegitoj estas elektitaj en la jenaj lokoj:

Hochwaldhausen (Germanio, Oberhessen). — D.: S-ro D-ro A. Mulert, Instruisto, Dürerschule.

Kymi (Finnlando). — D.: S-ro Kalle Huuskonen, Korkeakoski.
Örnskoldsvik (Svedio). — D.: S-ro C. W. Sjögren, oficisto, Storgatan 40.
Reutlingen (Germanio, Württemberg). — D.: S-ro O. Welzel, arkitekto, Krämerstr. 31/2.
Rouelles (Francio, Seine-Inférieure). — D.: S-ro H. Dubuisson, komerca oficisto.
Schweinfurt a. Main (Germanio, Bayern). — D.: S-ro J. Schumm, komercisto, Schopperstr. 4 II.

Ŝanĝoj:

Genève (Svisio). — D.: S-ro Joseph Halter, horloĝisto, 55, bd. Carl Vogt, Telefono 89.93.

Provizore ne plu estas Del. en jenaj lokoj:
Eutin (Germanio); *Graville Ste-Honorine* (Francio).

Antaŭ unu monato forlasis nian Oficejon S-ro William Perrenoud por akcepti en Cernier (Neuchâtel) sian unuan postenon kiel duagrada instruisto. Veninte ĉe ni je la fino de oktobro 1919, kiam ni urĝe bezonis plian oficiston, S-ro Perrenoud sindone kaj inteligente laboris por la movado. Ni deziras al li bonan sukceson en lia ofico kaj dankas por la valoraj servoj al ni faritaj.

La Direktoro de UEA.

Esperantista Parolejo

Pri la nunaj monbaroj

La milito pasis, kaj ke la postkrizoj iom post iom mildiĝu kaj plej eble baldaŭ malaperu, al tio povas kaj devas kunhelpi nia lingvo, kiu, kvazaŭ „Dornrozeto“ en la konata fabelo, per la kiso de l' pacanĝelo revekiĝis kaj nun volonte disvastigos sian benon tra la mondo. Sed bedaŭrinde la interrilatoj inter la diversaj mondpartoj estas malhelpataj ne nur de la limbaroj, ankoraŭ disigantaj kelkajn gentojn de la najbaraj gentoj, sed la plej gravaj malhelpaĵoj estas la monbaroj, kaŭzataj per la malfavora stato de l' mono de kelkaj ŝtatoj. Forigi tiujn barojn, ŝajnas al mi plej urĝa bezono por la Esperantistaro, ĉar nur per tio oni povos ree alligi la rompitajn fadenojn de konateco, amikeco kaj de interrilatoj de unu nacio al alia, per reciproka interŝanĝo de literaturaĵoj, de gazetoj kaj de aliaj aferoj, kiuj antaŭ la milito taŭgis, por alproksimigi la diverslandajn Esperantistojn unu al alia. Trovi al tiu celo la ĝustan vojon, ŝajnas al mi tre inda je komuna penado.

Ekzemple al ni Germanaj Esperantistoj nuntempe estas preskaŭ neeble aboni gazetojn, aniĝi al samcelaj societoj alinaciaj, aĉeti Esperantaĵojn alilandajn, k. t. p. pro la malalta valoro de nia mono registara. La movado por Esperanto multe plivigliĝus, se grupoj aŭ izoluloj povus ree aboni eksterlandajn gazetojn, ĉar sin okupi per Esperanto nur kun samlandanoj, estas same, kvazaŭ trinki kafon sen vera kafo, sen lakto, kremo kaj sukero. Por reebligi la antaŭmilite eblan interrilatiĝon, sufiĉas, ke la eksterlandaj grupoj, eldonejoj kaj vendejoj de Esperantaĵoj interkonsentu kun Germana bankfirmo, kiu, same kiel antaŭmilite, peras la monrilatojn inter aĉetantoj kaj vendantoj kaj konservas al la dispono de la kredituloj la pagitajn sumojn ĝis la tempo, kiam la monstato estos pliboniĝinta. Oni eble diros, ke estas malutilo por la vendinto, se li ne povas tuj disponi pri la mono, kaj ke tiu malebleco uzi la monon forigas lian intereson al interrilatoj kun tiaj eksterlanduloj. Tamen oni pripensu, ke estas eble pli granda malgajno, se gazeto, kiu povus havi centojn da abonantoj el unu ekstera lando, devas kontentiĝi per nur kelkaj unuopaj, kiuj estas en la malofta stato, ke ili povas senĝene elspezi eĉ la plej grandajn sumojn. Entrepreno, vere Esperantisme pensanta, devas plifaciligi al la abonemuloj aŭ aliĝemuloj abonon kaj aliĝon eĉ tiam, kiam provizore el tiuj ambaŭ ecoj la profito estas tre malgranda, eĉ kiam eble ĝi estas komence nula. Precipe la membreco ne devigu la estraron de iu unuiĝo aŭ societo al apartaj elspezoj por tiaj membremuloj, kies mono ne estas tuj elspezebla, sed estas rezervita kaj povas esti eĉ profitige elspezata, post kiam la baldaŭaj normalaj cirkonstancoj plivaloriĝos tiun rezervitaĵon.

Mi ekzemplis nur pri ni Germanoj, sed ankaŭ en aliaj ŝtatoj ekzistas la samaj nunaj malhelpaĵoj. Ĉu aŭ ne oni povas krei kompenson por tiu nunmomenta malprofito per tio, ke la Esperantistoj en ŝtatoj, kiuj troviĝas en pli bonaj kaj por ili tre profitigaj monstatoj, pagu libervole iom pli altan prezon, ol nun estas postulata oficiale? Mi estas certa, ke ĉiuj Esperantistoj en nuntempe malbonmonaj landoj tian komplezemon ne forgesus kaj volonte ĝin rekompencus per despli fervora laborado por niaj amataj Esperanto kaj Esperantismo!

Mi petas ĉiujn legintojn de miaj proponoj, skribi al la administrejo de UEA ilian opinion pri ili.

Paul Gottgetreu, Del. de UEA.

Helpo al Suferantaj Esperantistoj

(Raporto de la Svisa komitato por Helpo Aŭstriaj Esperantistoj)

Kun granda plezuro ni povas informi, ke nia alvoko al la Svisaj Esperantistoj havis kontentigan sukceson. Malgraŭ la oftaj petoj de multaj flankoj pri subteno, niaj amikoj tamen sendis, ĉiuj laŭ siaj povoj. La tuta kolekto donis la sumon de 440 frankoj. Jen la nomoj de la donacintoj:

Esp. Grupo Basel (11 fr.); *S-ro Borel* (5 fr.); *F-ino Crisinel* (10 fr.); *S-ro Ducommun* (5 fr.); *Esp. Grupo Genève* (10 fr.); *S-ro Egg* (10 fr.); *S-ro Fuchs* (5 fr.); *Anonima* (10 fr.); *S-ro Gila* (5 fr.); *S-ro H. Hodler* † (50 fr.); *S-ro Haller* (4 fr.); *S-ro Hodel* (5 fr.); *S-ro Haymo* (10 fr.); *S-ro Humberset* (5 fr.); *Esp. Grupo Lausanne* (10 fr.); *S-ro Jost* (7.50 fr.); *Ges-roj Krestanov* (20 fr.); *S-ro Monnier* (5 fr.); *S-ino Meylan-Mairet* (5 fr.); *F-ino Meyer* (5 fr.); *D-ro Moser* (10 fr.); *S-ro Müller, Zürich* (10 fr.); *S-ro Nicola* (10 fr.); *S-ino Umansky* (3 fr.); *S-ro Rusterholz* (10 fr.); *F-ino Reymond* (5 fr.); *D-ro Schacht* (20 fr.); *F-ino Vetsch* (5 fr.); *S-ro Hirzel* (10 fr.); *D-ro J. Vetsch* (5 fr.); *S-ino Sing* (10 fr.); *S-ro Scheurer* (5 fr.); *S-ro de Saussure* (5 fr.); *F-ino Schenk* (5 fr.); *S-ro Ed. Stettler* (10 fr.); *S-ro Stroele* (20 fr.); *F-ino Schütz* (5 fr.); *D-ro Ungar* (1 fr.); *S-ro Wolf* (10 fr.); *S-ro Wiesner* (5 fr.); *Esperanto Societo Rorschach* (10 fr.); *S-ro Bolliger* (5 fr.); *F-ino v. Känel* (3 fr.); *S-ro Perrenoud* (4 fr.); *S-ro Hediger* (10 fr.); *S-ro Marly, Bordeau* (50 Fr. fr.); *Ges-roj Hansjakob* (16.50 fr.).

Ni povis forsendi 40 pakaĵojn, enhavantaj lakton kondensitan, avenon, ĉokoladon, konservita viando kaj Maggi supojn. Jen la nomoj de la samideanoj, kiuj ricevos tian pakaĵon:

En Graz: *S-roj Bartel, Halbedl, Krejči, Dietl, D-ro Metzger, Wallner.*

En Innsbruck: *S-roj Blaas, Bederlunger, Glaser, F-ino Mayer, S-ro Simbriger.*

En Salzburg: *S-roj Pezlederer, Hinterhuber* kaj *Straniak.*

En Wien: *S-roj Deistler, Enterle, Hildbrand, Hloucha, Illing, Kaftan, Kolnhofer, Maschl, Molnar, Krieger, Oesterlein, Pfeffer, Schamanek, Sirk, Sobotik, Sòs, Stary, Ulm, Steinhauer, Vince, Winkler, Schröder, Zimmermann, Jacobsen, Čech* kaj *F-ino Staudner.*

Samideano Jayet el Morges bonvolas sendi senpere du pakaĵojn al S-roj *Bliemel* en Wien kaj *Pater Kamill* en Linz.
Pro la foresto de nia kasisto en Italio ni ne scias ĉu venis ankoraŭ subtenoj, post lia reveno ni ĉion prizorgos.

Ni ĉi-tie kore dankas al la donacintoj, kiuj bonvolis helpi iom al niaj suferantaj samideanoj.

En la nomo de la Komitato:
Robert Bolliger, Prezidanto.

Oni laŭdas!

∴ S-ro *St. Minkov*, Del. en Sofia, kore dankas S-ron Schauenberg, Del. en Winterthur, pro akurate kaj konscie plenumita servo.

